

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 577 (12) DECEMBRO 1953




Foto : Branko Luš

Malfermo de Zamenhof-strato en Zagreb
Estrarano D. Kennedy parolas

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Enhavo

Specialaj Artikoloj :

La Interna Ideo : <i>Hans Jakob</i>	paĝo
Analogiaj Komparoj : <i>L. L. Zamenhof</i> (<i>T. K. Slade</i>)	345
Zamenhof-Monumento : <i>I. Dratwer</i>	346
En Indonezio, lingvaj malfacilaĵoj : <i>M. de Waard</i>	351
	366

Rakontoj :

Kampado : <i>G. Agricola</i>	364
La Sorĉompisto : <i>E. Linz</i>	368

Poezio :

Rivaloj : <i>Eli Urbanová</i>	369
---------------------------------------	-----

39a Universala Kongreso :

Oficiala Komunikado N-ro 2	352
Nederlando, Kongreslando 1954 : <i>Hans Bakker</i>	353

Belartaj Konkursoj :

1953 (Poezio) Eltenu, mia kor' : <i>J. S. Dinwoodie</i>	347
1954 ("Ariel") Informoj	350

Konstantaj Rubrikoj :

Centro de Esploro kaj Dokumentado	355
Enigma Konkurso	370
Esperantista Vivo	365
Internacia Konkurso	372
Nia Forumo	362
Oficiala Informilo	371
Radio kaj Esperanto	358
Tra la Libraro	359
Tra la Mondo Esperantista	348

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 577

Decembro 1953



La Interna Ideo

IAM estis epoko en nia movado, kiam iuj eminentuloj klopodegis forgesigi la idealisman flankon de nia afero. Estas la realistoj, kiuj vidas en internacia lingvo *nur praktikan* flankon, la simpligon de rilatoj interpopolaj. La entuziasmo de la Esperantistoj, precipe de novbakitaj, ilin ĝenis kaj okazis, ke pro tio iuj tiaj nur-realistoj forlasis la movadon. Iuj pleje sentis sin malbone, kiam oni insistis pri la altmorala valoro de Esperanto, esprimita per la vortoj **“interna ideo”**. Kio ĝi estas do, tiu ĉi interna ideo—motoro, kiu puŝis milojn da homoj dediĉi sin al la disvastigo de nia idealo, ofte suferante mokon, ja eĉ insulton? Estas certe, ke tiuj pioniroj-propagandistoj-profetoj jam estis kaj estas idealismaj homoj, serĉantaj konkretigi propran senton de justeco. Ne estas do mirige, ke inter niaj aktivuloj pasintaj kaj nunaj estis kaj estas homoj defendantaj ankaŭ postulojn je socia justeco.

La interna ideo—kio ĝi do estas? Kiu por la unua fojo ĉeestis internacian kongreson de Esperanto kaj unuafoje kontaktiĝis kun samideanoj alilandaj tuj sentas tiun ĉi ligitecon, kiun nacia lingvo uzata inter malsamlingvanoj ne povas doni. Estas mistika sento, konkretigita en lingvo. Oni povas diri kion ajn oni volas kontraŭ mistiko; ĝi troviĝas eĉ ĉe

plej racie pensantaj homoj. Nu, la mistiko de Esperanto nur povas esti komprenata kiam oni posedas la lingvon, sekve post penado.

La interna ideo estas ankaŭ kompreno kaj praktiko pri justeco. Ĝenerale Esperantisto praktikanta prijuĝas ekzemple naciajn aferojn (de aliaj popoloj) objekte. Li scias, ke la sama konsidero ekzistas ankaŭ kontraŭflanke; li serĉas kompreni aliulon. Li ne estas la homo de malkaraj frazoj, de laŭtempaj “sloganoj”; li analizas, komparas kaj juĝas.

Sed ekzistas dokumento hodiaŭ, tre grava dokumento, bazo de la interpopola rilato. Tio estas la Universala Deklaracio de Homrajtoj, proklamita 10.XII.1948 de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu enhavas la konkreigon de la interna ideo. Konsideri homon kiel homon, egale je kia raso li apartenas, kian religion li praktikas kaj kian lingvon li parolas. La Deklaracio estas la kodo homarana, la rekono de la homrajtoj per la plej alta instanco interŝtata.

Iuj eble (kaj prave) rimarkigos, ke la sinteno de la plej multaj ŝtatoj ja neniel konformiĝas je tiuj reguloj, eĉ kontraŭas ilin. De litero ĝis ago estas longa vojo, neniue scias ĝin pli bone ol ni Esperantistoj kiuj klopodas ja pli ol duonjarcenton por ĝeneraligi internacian lingvon. Nenio estas

akirata senpene; la lukto estas la patro de la sukceso.

La 15a de decembro estas nia tago de prepenso kaj de meditado pri nia afero. Ni memoras la kreinton de nia lingvo, kaj se oni povus rekomendion por legi dum Zamenhofa Vespero, tiam estas la *Antaŭparolo al la Fundamento*, vortoj neniam perdontaj aktualecon. La ideoj esprimataj en tiu ĉi teksto kaj kiujn ni sekvis fidele,

certigis al ni la unuecon de la lingvo, kaj baris la vojon al lingva sektismo. Kiu ajn aŭtoritato okupiĝas pri internacia lingvo devas atenti nin. Sen la *Fundamento de Esperanto* kaj sen la Interna Ideo, ni starus je sama nivelo kiel dekoj da projektoj sin interbatalantaj. Kun tiu-ĉi konvinko ni finu la jaron 1953 kaj ni eniru 1954, jaro grava por nia celado.

Hans Jakob.

Analogiaj komparoj

faritaj de D-ro L. L. Zamenhof

MULTAJ jam laŭdegis diversajn facetojn de la genio de Ludoviko Zamenhof, sed mi ne rimarkis noton pri liaj ege trafaj analogiaj komparoj. Ofte, post logika diskuto, li tiamaniere kristaligis sian argumenton en formon, kiu enradikiĝas en la memoro de la leganto kaj tie ĝi restas por efekte konstati la konkludon celitan de Zamenhof. Jen kelkaj ekzemploj:

Defendante “artefaritan” lingvon kontraŭ atakoj de tiuj, kiuj pretendis, ke lingvo devas esti “natura”, li skribis: “Ĉiuj riveroj en la mondo havas fluon tre kurban kaj tre neregulan. Sed se iu kun instrumentoj en la mano arte fosante kanalon, volus sekvi tiun ĉi ‘leĝon naturan’, ĉu vi laŭ dus lin, aŭ ĉu vi eĉ iom povus lin pravigi? Ĉiuj lingvoj naturaj havas grandan amason da malregulaĵoj kaj malfacilaĵoj — ĉu ni ankaŭ devas sekvi tiun ĉi ‘leĝon naturan’ kaj intence fari nian lingvon malregula kaj malfacila?”

O.V. p. 119.

Li esprimis sian fidon al la fina prudento de la homaro, malgraŭ ke li plej bone komprenis ĝian aktualan

ŝanceliĝon kaj bigotan kontraŭstaron antaŭ novaj ideoj, laŭ la sekvanta simpla analogio: “Se du homaj grupoj estas disigitaj unu de la alia per rivereto, sed scias, ke tabuloj por la kunigo de ambaŭ bordoj kuŝas tute pretaj apud iliaj manoj, tiam oni ne bezonas esti profeto, por antaŭvidi kun plena certeco, ke pli aŭ malpli frue tabulo estos transĵetita trans la rivereto kaj komuniĝado estos aranĝita. Saĝaj homoj diras, ke celado al aranĝo de komuniĝo estas infanaĵo, ĉar neniu el ili okupas sin je metado de tabuloj trans rivereto kaj tiu ĉi afero estas tute ne en modo. Spertaj homoj diras, ke la antaŭuloj ne metadis tabulon trans rivereto, sekve ĝi estas utopio. Instruitaj homoj pravas, ke komuniĝado povas esti afero natura kaj ke la homa organismo ne povas sin movadi sur tabuloj, k.t.p. Tamen pli aŭ malpli frue tabulo estas transmetata kaj la komuniĝado estas aranĝita.”

O.V. p. 286.

Kuraĝigante tiujn, kiuj ekperdis esperon pro ne baldaŭa sukceso, li skribis: “La glacio longan tempon kontraŭstaras al ĉiuj penoj de la

printempa suno ; sed kiam dank' al la konstanteco de la sunaj radioj la fluidiĝo fine komenciĝas, tiam la tuta glacio rapidege fluidiĝas en kelkaj tagoj.”

O.V. p. 123.

Respondante al la akuzo, ke sukceso de Esperanto detruus naciajn lingvojn : “Timi, ke lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn, estas tiel same ridinde, kiel ekzemple timi, ke la poŝto, kiu donas al homoj malproksimaj unu de alia la eblon komunikiĝadi, minacus neniigi la buŝajn interparoladojn inter la homoj !”

O.V. p. 281.

Sugeston, ke la kongreso aranĝu kompetentan komitaton por krei

artan lingvon, li forpelis sen argumento per mallonga frazo : “Komisii al komitato la kreadon de nova lingvo estus tiel same sence, kiel ekzemple komisii al komitato verki bonan poemon.”

O.V. p. 303.

Plendante por unueco kontraŭ fruaj entuziasmoj, kiuj deziris “plibonigi” la lingvon, li skribis : “La kreo de la alfabeto alportis al la homaro grandegan utilon ne tial, ke ĝi estas absolute perfekta, aŭ ke la formon de tiu aŭ alia litero oni ne povas anstataŭigi per formo pli bona, sed tial, ke ĉiuj uzas la alfabeton egale.”

*Leteroj de Z. vol. II p. 75.
Kompilita de T. K. Slade.*

Belartaj Konkursoj 1953 : Poezio Traduka

Andrew Lang :

Eltenu, mia kor !

Eltenu kor' ; ne longe vin dispremos
la honto kaj dolor' ;
pasis malbono, bono ; fino venos ;
eltenu, mia kor' .
Du vazoj staras, kie glore tronas
Zeŭs' en ĉiela sfer' ;
el tiuj ĝojon, triston li disdonas
al homoj, sur la ter' .
Entenis via viv' perfektan parton
de l' granda ĝu-trezor' ,
feliĉon, triston, luktojn, amo-ardon ;
eltenu, mia kor' !

Luktenda nun de vi batalo lasta,
finluktu en fidel' ;
kunulojn poste serĉu en la vasta
kampo de l' asfodel' .
Hektoro estas tie, kaj la homoj
falintaj antaŭ Troj' ;
memore rebatalos ni, fantomoj,
kaj ree venos ĝoj' .
Kvankam neniun suno tie brilos,
preter l' ŭesta glor' ,
en la ripoz' eterna vi trankvilos ;
eltenu, mia kor' !

Ĉi tiu poemo, anglalingve *Endure my heart*, en tradukformo de John S. Dinwoodie gajnis la duan premion.



Tra la Mondo Esperantista



Argentino

La unuan fojon en Argentina Respubliko, strato ricevis la nomon *Zamenhof*. Tio okazis en la urbo General Alvear (provinco Mendoza) dank' al la iniciato de S-ro José Peró, membro de ties magistrato. Strato Zamenhof estas unu el la centraj stratoj de la urbo.

En la venonta kunsida periodo, li intencas peti la nomigon de alia strato *Esperanto* kaj por kuraĝigi la magistraton li petas alsendon de gratulleteroj, prefere de asocioj aŭ urbaj aŭtoritatoj, rekte al *Sr. Presidente del H. Consejo Deliberante, Municipalidad de General Alvear (Mendoza), Argentino*.

Japanujo

Okaze de la 40a Japano Esperanto-Kongreso, *Asahi Graph* la plej granda semajna bildgazeto en Japanujo kun cirkulado de 200.000 ekz., en sia seria sekcio "Anonctabulo" en la numero 16 Septembro, aperigis artikolon kun portretoj de "Japanaj Esperantaj Spertuloj". Du plenajn grandformatajn paĝojn okupis portretoj de sep Esperantistaj eminentuloj.

* * *

La librejo Heibonsya, unu el la plej gravaj eldonaj entreprenoj en Japanujo, entreprenas eldoni kolekton da literaturaj verkoj de geknaboj de la mondo. Kiel la unua paŝo ĝi komisiis al japanaj delegitoj

al la Internacia Instruista Kongreso leterojn al alilandaj instruistoj skribitajn en Esperanto petante ilin pri kunlaboro. Ĝi presigis broŝuron "El Japano Lando kaj Popolo" entenantan Esperantajn tradukojn de verkoj de japanaj infanoj. Kunlaboro de edukistoj de la tuta mondo estas petata. Interesitoj skribu al Heibon-sya, Yomban-tyô, Tiyo-da-ku, Tokio.

Jugoslavujo

Post la kongreso estas en tiu lando granda intereso por nia afero. La internacia lingvo estas instruata ne nur en multaj lernejoj, sed estas ankaŭ granda alfluo al la kursoj. En Zagreb nun estas gvidataj pli ol 10 kursoj ne enkalkulante lerneajn kursojn. En unu kurso partoprenas 16 profesoroj el zagrebaj gimnazioj. Tiel fartas la afero en Zagreb, sed ankaŭ en provincaj lokoj kaj vilaĝoj ĉie estas intereso, kaj la raportintoj (Kroatia Esperanto-Ligo) estas superŝutataj per informpetoj kaj diversaj petoj por helpo. Domaĝe ili estas en neagraba situacio nehavante lernolibrojn, sed nun pritraktas preson de nova ampleksa gramatiko prilaborata de Bozidar Vanĉik.

Portugalujo

Radiostacio Polo Norte (Caramulo) dissendas Esperanton ĉiumerkrede per ondlongo 205m., je la 17a horo, dum 20 minutoj. La respondanto estas S-ro Saldanha Carreira. Ĉar la

voĉo de la privata stacio atingas nur la ĉirkaŭajn distriktojn, oni registras la paroladojn kaj sendas la bobenojn al aliaj privataj stacioj por ĝenerala disaŭdigo. La bobenoj iros poste al la Acoroj kaj Afriko. Agu same en la tuta mondo, kaj danku la stacion. La loka gazetaro bone raportas.

Urugvajo

La movado en tiu lando vigle preparas sin por la proksimiĝanta konferenco de UNESKO en sia ĉefurbo Montevideo. Ĝi kunlaboras en ĉiu-rilato kun nia Centro de Esploro kaj Dokumentado rilate la grandiozan laboron farotan. Lastatempe ekaperis radiodisaŭdigoj en la Internacia Lingvo. Interalie, unu oficiala dissendstacio aŭdigas la voĉon de la prezidanto de Urugvaja Esperanto-Societo, Prof. Fernández Menéndez, ĉiun unuan mardon en la monato, je la 11a.30 loka tempo.

Usono

La Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko okazigis sian 43an Kongreson en la urbo New York de la 27a ĝis la 30a de junio, 1953. Ĉeestis membroj el 17 ŝtatoj de Usono kaj 2 provincoj de Kanado. Honora gasto estis D-ro Stephan Zamenhof, nevo de la kreinto de Esperanto. Novelektita prezidanto estas Profesoro John M. Brewer. Festeno en la fama itala restoracio "Guffanti", kun Esperanta menuo, malfermis la kongreson je la sabato vespero.

Dimanĉon vespere membroj de la Esperanto-Societo de New York prezentis unuaktan komedion "La Provo". Ankaŭ estis por la unua fojo montrita nova belkolora sonfilmo en Esperanto "Aŭstralio Hodiaŭ," eldonita de la oficiala Inform-Servo

de Aŭstralio. Parolanto de la Esperanto-komentario estas S-ro G. Alan Connor. La filmo (16 mm.) estas nun disponebla al Esperanto-grupoj kaj kunvenoj tra la mondo. Interesatoj skribu al EANA.

La kongresanaro vizitis la sidejon de la Unuiĝintaj Nacioj, interalie por aŭskulti la Ĝeneralan Helpsekretarion de UNO, S-ro Benjamin Cohen kaj la Direktoron de la UNESKO-oficejo en New York, S-ron Solomon V. Arnaldo. Dum tiuj paroladoj oni okupis seĝojn, en kiuj ordinare sidas registaraj delegitoj.

La ĉeesto de multaj eksterlandaj gastoj (ankaŭ de novenmigrintoj el kvin orienteŭropaj landoj) donis al la tuta kongreso vere internacian atmosferon.

Sveda Somera Semajno 1954

La ĉijara prelegsemajno en Frostavallen, Svedujo, bone sukcesis, kaj la temaro "Internacia Kultur-interŝanĝo" altiris grandan intereson ne nur ĉe la partoprenantoj sed ankaŭ ĉe la gazetaro kaj ĉe la UNESKO-konsilantaroj, kiuj ricevis informon pri la prelegoj.

Ni daŭrigos en 1954, kiu jaro estos por ni tre grava. La prelegsemajno okazos 8-15 aŭgusto 1954, sekve tuj post la UK en Haarlem. Frostavallen situas en la suda parto de Svedujo, kaj oni bone povas atingi la lokon post la fino en Haarlem.

Jam nun oni povas sin anonci al S-ro Jan Strönné, Amiralsgatan 36, Nalmö, Svedujo. La nombro de la partoprenantoj estas limigita. Informojn kaj detalojn pri la programo ni donos poste. Sveda Esperanto-Instituto aranĝos la prelegsemajnon.

Muzika kaj Mondlingva Konkurso

“Ariel” *

KUN penso pri la aktualiĝanta decido pri la mondlingvo, S-ro Gino Catarzi (Verona) kun la helpo de la Esperanto-Grupo de Verona iniciatis kaj asignis sume 50.000 italajn lirojn por la jenaj belartaj konkursbranĉoj kaj por la sub punkto 5 prezentita *Premio José Enrique Rodó*.

1. Laŭro Kalomano Kalocsay. Premio 10.000 italaj liroj por la plej bona originala komponaĵo muzika, kantebla, ĝis nun ne publikigita, kies baza teksto estas literaturvalora originala poeziaĵo en Esperanto (aperinta post la komenco de 1930). Unu persono rajtas konkursi per maksimume tri komponaĵoj. La teksto estu prezentita sub la muziknotoj.

2. Laŭro Esperanto 1954. Premio 10.000 liroj, por originala ĝis nun nepublikigita poemo en la mondlingvo Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1 ĝis 3 poemoj kun suma amplekso de 108 versoj.

3. Laŭro Urugvajo. Premio 10.000 liroj por hispanlingva, ĝis nun nepublikigita traduko de literaturvalora(j) originala(j) poemo(j) aperintaj post la komenco de 1930 en la lingvo Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1 ĝis 3 poemoj kun suma amplekso de 108 versoj.

4. Laŭro Verona. Premio 10.000 liroj (a) por *versa* traduko, Esperantlingva, de la t.n. “balkona sceno” el *Romeo and Juliet* de Shakespeare, de la vortoj “Can I go forward when my

heart is here” (II-a akto la sceno) ĝis la fino de la 2a sceno—*kaj* parton de la lasta sceno de la tragedio, t.e. tiun parton de la 3a sceno el la V-a akto, kiu komenciĝas per la vortoj “Enter Montague and other”; (b) aŭ por tradukita, eventuale originala poeziaĵo en Esperanto, kies temo aŭ medio kaj etoso estas ligita al Verona. En la sub-branĉo (b) oni rajtas konkursi per 1 ĝis 3 poemoj kun sume 108 versoj. La du subbranĉoj estos kune juĝataj por la laŭro.

5. Premio José Enrique Rodó. 10.000 liroj aljuĝota al la plej altvalora kaj arte plej elstara konkursaĵo el la kvar branĉoj, supre menciitaj.

Ĝeneralaj informoj



Ĉiu poeto kaj komponisto de la tuta mondo rajtas partopreni la konkurson.

Oni sendu ĉiun konkursaĵon en ses ekzempleroj al la konkursa sekretario D-ro F. Szilágyi, 3-dje Villag. 26, Borås, Svedujo. En la branĉoj 3 kaj 4 (b) aldonu la saman nombron de la eventualaj originalaĵoj. Skribu vian pseŭdonimon sur la konkursaĵojn kaj ankaŭ sur apartan paperon kaj metu tiun lastan—se la enlandaj reguloj permesas—en fermitan koverton kune kun via nomo kaj adreso. Pri la konservo de la anonimeco de la konkursantoj en ĉiuj okazoj respondecas la sekretario de la konkurso. Oni rajtas konkursi eĉ sub “verkista” nomo.

Aldonu tri maldekstre stampitajn internaciajn respondkuponojn. Se enlanda regulo ne permesas la elsendon de tiom da kuponoj, sendu

* Omaĝo al la urugvaja klasikulo J. E. Rodó kaj lia (en Esperanton tradukita) ĉefverko “Ariel”.

La Zamenhofa monumento



GESAMIDEANOJ, partoprenintaj solenaĵojn ĉe la Zamenhofa tombo eĉ antaŭ la milito kun bedaŭro povis konstati, ke la monumento starigita de la tutmonda Esperantistaro en 1926 perdis sian antaŭan aspekton. Sur ĝi aperis makuloj, kiujn kaŭzis atmosferaj ŝanĝoj kaj influo de tempo. Ankaŭ la fera barilo ĉirkaŭanta la spacon de la tombo de Zamenhof kun la verda stelo kreskaĵoj rustiĝis. Tial estis necesa ĝenerala ordigo de la monumento. La Estraro de la Asocio de Esperantistoj en Pollando ne disponis pri la necesaj monrimedoj, tial ĝi laŭ propono de samideano Roman Sakowicz, iama ĉefdelegito en Polujo, turnis sin al la Estraro de UEA petante helpon. Responde UEA asignis 2000 zlotojn por tiu celo. Tamen la afero ne estis ankoraŭ solvita. Masonista kooperativo postulis por la farota laboro pli ol

4000 zlotojn. Ankaŭ aliaj firmaoj postulis sufiĉe multe da mono. Feliĉe ni sukcesis trovi metiiston, kiu konsentis plenumi la laboron por la ofertita sumo.

Estas farita jene: la tuta monumento estas purigita kaj makuloj forigitaj, la aperinta fendo cementumita, la literoj orumitaj, la zono ĉirkaŭ la globo orumita, la barilo nigrigita, la steloj sur la globo verdigitaj. Je tiu okazo estas nigrigitaj literoj sur la monumento de Klara Zamenhof, troviĝanta apude, kaj ties fera barilo. La Zamenhofa monumento aspektas nun preskaŭ kiel nova. Mi skribis preskaŭ, ĉar la uzita ora farbo ne estas tro bona kaj la alia bedaŭrinde ne estas ricevebla. Se iu samideano povus donace sendi la "oran" kaj verdajn farbojn ni eventuale vivigus la kolorojn sur la monumento.

Teksto kaj fotoj de

Isaj Dratwer, Varsovio.



39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando
31-an julion—7-a aŭguston 1954

N-ro 2

OFICIALA KOMUNIKO

Novembron 1953

Fakaj Asocioj. Organizitaj kaj agnoskitaj fakaj asocioj, kiuj intencas okazigi fakan kunsidon dum la kongreso, bonvolu kiel eble plej baldaŭ anonci sin ĉe la L.K.K. kaj sciigi siajn dezirojn.

Karavanoj. Personoj kaj instancoj, kiuj organizos karavanojn al la kongreso en Haarlem, bonvolu sin anonci al la L.K.K.

Peranto. Interkonsento estas atingita laŭ kiu germanoj povos pagi kotizojn al la Germana Esperanto-Asocio, Berg. Gladbacherstr. 1095, Köln-Dellbrück, Germanujo. G.E.A. postulas makleron de DM. 0.50 por la servo. Nepre sendu la aliĝilojn al la sama instanco al kiu oni pagas.

Limigo de partopreno. Tial ke la kongresa urbo estas turisma centro kaj ankaŭ sekve de la fakto, ke la enteneblo de salonoj estas limigita, la partopreno en la kongreso estas limigita je ĉ. 2000 personoj. La nombro de enlandanoj estas limigita je 750. Sekve frua aliĝo estas konsilinda. Post atingo de la cititaj ciferoj la L.K.K. malakceptos pluajn aliĝojn, kaj certe post la 30a de junio 1954. Ne supozu, ke aperos “tagaj kartoj” en la nuna kongreso!

Karavano. Karavanon al Haarlem gvidos S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danujo, al kiu oni povas sendi ankaŭ kotizojn. (Tiu estas

aldono al la “oficiala” karavano de C.D.E.L., kies peranto estas S-ro G. Kühlmann, Pr. Jørgensgade 4 A II, København N).

Postkongreso. Krom la kutimaj postkongresaj ekskursoj, okazos oficiala Postkongreso 4-taga en Leeuwarden, norda Nederlando. Detaloj sekvos.

Statistiko (ĝis 31 okt.) : Aŭstrujo 1, Belgujo 5, Brazilo 3, Britujo 49, Danujo 3, Finnlando 6, Francujo 11, Germanujo 14, Hispanujo 3, Italujo 5, Japanujo 1, Jugoslavujo 22, Kanado 2, Kostariko 1, Nederlando 138, Norvegujo 4, Novzelando 1, Svedujo 23, Svislando 11, Usono 4. Sumo 307 en 20 landoj.

Nome de la L.K.K.,

Mason Stuttard, K.K.S.

(daŭrigo de paĝo 350)

laŭ la validaj reguloj malpli. El tiuj landoj, kiuj tute ne permesas la elsendon de kuponoj oni rajtas sendi konkursaĵojn sen aldono de ia kotizo.


Limtempo por la ricevo de la konkursaĵoj el Eŭropaj landoj estas la 15a de marto, por landoj ekster Eŭropo, la 10a de aprilo, 1954.

Pri la kunmeto de la diversnacia komisiono kaj pri la publikigo de la rezultoj en Montevideo dum la aŭtuno 1954, detalaj informoj sekvos poste.

D-ro F. Szilágyi.

Hans Bakker :

Nederlando, kongreslando 1954



Amsterdam : Preĝejo S-ta Nikolao

VIA kongresurbo Haarlem troviĝas en *Holland*. Vi jam delonge scias tion kompreneble ĉar vi ĉiam atente aŭskultis en la lernejo kaj precipe dum la geografia leciono. Tamen povas esti miskompreno ĉar Haarlem troviĝas ankaŭ en *Nederland*. Ĉu ekzistas du Haarlem-oj? Ne, kara mia, sed *Holland* estas nur distrikto, provinco de Nederlando. Ekzistas eĉ du provincoj *Holland*: *Zuid* (Suda)-*Holland* kaj *Noord* (Norda)-*Holland*. En la lastnomita troviĝas Haarlem. Krome ekzistas ankoraŭ naŭ provincoj. Kune ili formas Nederlandon.

Nederland signifas “malalta lando”. Ĝi estas la plej malalta parto de Nordokcidenta Eŭropo. Jen la kaŭzo kial troviĝas tie la elfluejoj de la tri grandaj riveroj *Rijn* (Rejno), *Maas* (*Meuse*) kaj *Schelde* (*l'Escaut*). Tial ke la veturado per ŝipo estas la plej ekonomia maniero por transportado, rezultis el tio, ke la trafiko povis flori.

El tiu trafiko kreskis la komerco. Danke al ĉi tiu favora situacio Nederlando povis fariĝi bonstata lando. Multaj nederlandanoj fariĝis maristoj. Ili traveturis la tutan mondon. Ili kunportis ne nur varojn sed ankaŭ elmigrantojn. Nederlando ja estas nur malvasta tereno. La popolo kreskas konstante kaj tial la “domo” daŭre estas homplena. La entreprenemaj nederlandanoj do serĉis novan terenon. Jen la kaŭzo kial ni en preskaŭ ĉiu parto de la tero trovas nederland-devenajn homojn kaj nomojn.

Kiam vi rigardas la geografian karton de Nederlando vi rimarkas, ke estas granda “truo” en la mezo de la lando. Ĝi nomiĝas *Ijsel-meer* (Ijsel-lago), la antaŭa *Zuider Zee* (Suda Maro). La vorto *maro* estas iom tro grandioza nomo por ĉi tiu golfo, kiu estas tro malprofunda por granda ŝipoj. Nur en la mezepoko kelkaj havenurboj floris, inter ili Enkhuizen, Stavoren kaj Hoorn, sed ili jam


delonge perdis sian iaman gloron. Amsterdam, kiu same troviĝas sur la bordo de la Suda Maro, estus suferinta la saman sorton se ĝi estus konstruita alian en- kaj el-irejon kun kontakto kun la Norda Maro. Ĝi konservis sian pozicion kaj estas la dua haveno post Rotterdam. La transportado de la varoj de la haveno al la diversaj vardomoj en la urbo okazas—pro jam konata kialo—ŝipe. Tial granda reto de kanaloj tranĉas la urbon. Preskaŭ 400 pontoj kontaktigas la bordojn kaj tial vi ne rimarkas, ke vi troviĝas sur insularo. Nur kiam iu ponto estas levita por preterlasi ŝipon oni konscias pri ĉi tiu insularo.

Kiam oni alvenas vagonare en la Centra Stacidomo oni jam staras sur insulo. Elirante el la stacidomo oni rimarkas, ke oni devas tuj transiri ponton por iri en la urbon. Maldekstre oni vidas la preĝejon de S-ta Nikolao tiel nomitan ĉar S-ta Nikolao estas la patrono de la maristoj. Rekte antaŭe troviĝas strato iom larĝa. Ĝi fakte estas la kajo de la rivero Amstel, apud kiu ambaŭflanke la urbo estas konstruita. Je la kontraŭa flanko ne estas kajo, eĉ ne bordo, ĉar la domoj staras rekte en la akvo. Je tiu


flanko ili estas atingeblaj nur per ŝipo. Daŭrigante la vojon laŭlonge de Amstel oni vidas, ke la rivero subite finiĝas. Tio estas nur ŝajno. La granda konstruaĵo, la komerco-borso, estas konstruita en la rivero sed la akvo fluas en granda tubo sub ĝi. La akvo reaperas post unu kilometro.

Preteririnte la borson oni troviĝas sur la ĉefplaco de la urbo. Ĝi nomiĝas *Dam*. La dua foto montras al vi ĉi tiun placon. La konstruaĵo en la fono estas la reĝa palaco. La nomo ne estas tute ĝusta ĉar la reĝino ne loĝas tie. Ŝi loĝas en Soestdijk, urbeto 35 km. sudoriente de Amsterdam. Nur dum oficiala vizito la konstruaĵo estas uzata. Origine la palaco estis la urbdomo. Dum la franca periodo en la komenco de la pasinta jarcento Ludoviko Napoleono enloĝis la urbdomon. Poste ĝi restis konservita por la ŝtatestro. Dekstre troviĝas la “Nova Preĝejo” konstruita en la dekkvina jarcento, do iom nekongrua nomo por tiel malnova preĝejo. Ĝi tamen estis la due konstruita preĝejo kaj tial konservis sian nomon.

Multon ankoraŭ mi povus rakonti sed tiel mi ne plu havus kion rakonti al vi en venonta numero. Do, ĝis...



Amsterdam : Damplaco



Centro de Esploro kaj Dokumentado
 300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Kiel oni lernas Esperanton?

En la Marta numero (1953) de la revuo *Esperanto* la Centro de Esploro kaj Dokumentado sciigis pri sia Enketo pri Lernado de Esperanto kaj petis la legantojn tiucele sendi respondojn je kelkaj demandoj al nomita kunlaborantino de la Centro, S-ino S. V. Sly-Reed. Dum monatoj la respondoj venadis el plej disaj landoj, kaj fine de Septembro oni zorge analizis ilin kaj kompilis la statistikon, kiu aperas en la aldonita tabelo.

La demandoj estis jenaj :

- (1) Lando (en kiu vi naskiĝis)
- (2) Sekso
- (3) Kiom da jaroj vi havis, kiam vi ellernis Esperanton ?
- (4) Kian instruitecon vi havis, kiam vi ellernis Esperanton ?
- (5) Ĉu vi ellernis Esperanton
 - (a) kiel gepatran aŭ familian lingvon ?
 - (b) en kurso organizita de iu Esperanta societo, grupo, asocio aŭ alia organizaĵo ?
 - (c) en ŝtata, provinca aŭ urba lernejo ?
 - (d) Kiel memlernanto el lerno-libro ?
- (6) Subskribo.

La respondoj al (3) estis dividitaj en 5 grupojn : (a) tiuj malpli ol 15-jaraj ; (b) tiuj inter 16 kaj 25 jaroj ; (c) tiuj inter 26 kaj 40 jaroj ; (d) tiuj inter 41 kaj 60 jaroj ; kaj (e) tiuj kiuj havis pli ol 60 jarojn.

Rilate la instruitecon (demando 4), la partoprenantoj estis petataj

respondi per “elementa”, aŭ “nekompleta mezgrada”, aŭ “mezgrada”, aŭ “universitata”. Tio kompreneble povas provizi nur proksimuman ideon pri la nivelo de edukado de la Esperantistoj, pro la diverseco en la edukaj sistemoj en ĉiuj landoj. Tiuj, kiuj lernis kiel infanoj antaŭ ol ĉeesti lernejon, estas klasifikitaj sub “elementa”.

La plej grava demando estis la 5a kaj por multaj la plej malfacila. Tiuj, kiuj komencis la lernadon per kurso, ofte perfektigis sian scion per hejmstudado ; tiuj, kiuj unue lernis hejme, multe profitis poste per kurso aŭ grup-kunvenoj. En tia okazo oni estis petata indiki la plej gravan faktoron. Sufiĉe multaj lernis per koresponda kurso, kaj en kelkaj landoj radio-kurso multe helpis la hejmstudentojn. Kelkaj juĝis tutmondan korespondadon aŭ legadon la ĉefa faktoro en la studado. Iuj lernis en lernejoj kie oni instruas Esperanton : nur tiujn oni kalkulis sub la rubriko “lernado en lernejo”. Kompreneble multaj plenaĝuloj ĉeestis kursojn en vesperaj popol-lernejoj k.s., sed la tabelo ne distingas inter tiuj kaj la lernintoj en grup-kursoj, ĉar la maniero de lernado estas tute simila, kaj la studintoj partoprenis kurson de vesper-lernejo aŭ grupo laŭ la lokaj eblecoj. Plue, preciza divido de la respondoj inter tiuj du kategorioj estus praktike iom malfacila afero.

Nun kelkaj rimarkoj pri la rezultoj. Unue estas necese atentigi ke la nombro de respondoj de iu lando estas influata de diversaj faktoroj,

inter kiuj oni menciuj : (a) la nombro de Esperantistoj en ĉiu lando ; (b) la malfacileco en kelkaj landoj rilate pagon de kotizo al U.E.A. kaj sekve la malgranda nombro da legantoj de la revuo (en kiu la Enketo publikiĝis); (c) la bedaŭrinda fakto, ke en landoj malproksimaj de Eŭropo iuj ŝajne kredis, ke la respondoj ne venos sufiĉe frue, do ne valoras sendi (tion indikas fakto, ke kelkaj pro tio sendis aerpoŝte); (d) en iuj landoj oni antaŭe havis multe pli komplikajn enketon, do la homoj emis ne atenti la duan.

Estas interese noti la grandan plimulton de viroj super virinoj, eĉ en landoj, kie ekzistas tiel nomata "egaleco inter la seksoj" kaj spite la fakton, ke virinoj havas la reputacion lerni lingvojn pli facile.

La rezulto pri aĝo montras, ke oni povas sukcese lerni en kiu ajn aĝo, eĉ en mezaĝo kaj poste.

Same, homoj kun elementa edukado ofte lernis tiel bone kiel pli alte instruitaj homoj. Estas rimarkeble inter la respondoj, ke tiuj kun elementa instruado emas lerni per kursoj, kaj *tiuj kun universitata edukado preskaŭ senescepte estas memlernantoj*. Iom pli ol la duono havis la eblecon aŭ preferis lerni per kurso, sed aliaj, precipe en izolitaj lokoj, tute sukcese instruis sin mem.

Fine estas interese noti la nombron (39) de tiuj, kiuj lernis la lingvon tute nature kiel familian lingvon. Eble unu el la gepatroj ĉiam parolis Esperanton kun la infaneto, dum la alia uzis la nacian lingvon, aŭ, se gepatroj apartenis al du nacioj kaj havis Esperanton kiel solan komunan lingvon, Esperanto estis la ĝenerala lingvo de la familio.

S. V. Sly-Reed,
kunlaborantino de CED.

Dok. CED/3 ankaŭ en la nederlanda kaj itala lingvoj

Ni jam informis, ke la konata Dok. CED/3, publikigita okaze de la UNESKO-Konferenco en Parizo, aperis en presita formo en la lingvoj franca, ĉeĥa kaj finna. CED rajtigis la presigon de la dokumento ankaŭ en la nederlanda kaj itala lingvoj. La nederlanda traduko jam estas publikigita kaj estas havebla ĉe F-ino Marianne Vermaas, Rotterdam C, 70 Nieuwe Binnenweg je la prezo de 1 gld. por 10 ekzempleroj, aŭ 9 gld. por 100 ekzempleroj. La itala traduko baldaŭ aperos kaj estos havebla de la Informa Fakto de la Itala Esperanto-Federacio, Torino, Via Saluzzo 44.

Donacoj al CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 8-an de Septembro 1953	198	4	2
Knaba Esperanto-Grupo, Elleston (dua donaco)	..	10	0
G. C. Jervis, Anglujo	..	10	0
D-ro W. P. Roelofs, Nederlando		18	0
Stato la 4-an de Nov. 1953	£200	2	2


Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris X, aŭ al la Centro mem.

Korekto

La artikolo de A. Sauvageot *Sonimitaj Vortoj* (vidu paĝon 327) ne estas tradukita de D-ro Kempeneers, sed de S-ro H. Castel en Bruselo. D-ro Kempeneers proponis la artikolon al ni. Nian pardonpeton al ambaŭ sinjoroj.

Tabelo pri la rezultoj de la enketo pri lernado de Esperanto

	Lando	Sumo	Sekso		Ago de ellerno						Instruiteco			Maniero de ellerno				mem- lern.		
			vir- oj	in- oj	—15	16—25			26—40		41—60	60—	elem- enta	mezgrada		Uni- ver.	fam- ilio		kur- so	ler- nejo
						ne-k.	kom.													
1	Argentino	3	2	1	0	2	1	0	0	0	0	2	1	0	0	0	0	0	3	
2	Aŭstralio..	4	3	1	0	1	2	1	0	0	1	2	0	0	0	1	0	0	3	
3	Aŭstrujo ..	7	4	3	1	5	1	0	0	0	2	0	2	2	2	0	0	0	3	
4	Belgujo ..	25	20	5	2	15	7	1	0	0	7	13	3	0	12	0	0	13		
5	Brazilo ..	1	1	0	0	1	0	0	0	0	1	0	0	0	0	0	0	1		
6	Britujo ..	148	98	50	13	50	55	24	46	6	16	61	25	5	82	1	60	60		
7	Bulgario	2	2	0	1	1	0	0	0	0	1	0	1	0	0	0	2	2		
8	Ĉeĥoslovakujo	131	82	49	13	67	37	11	19	3	87	19	6	6	81	2	42	42		
9	Danujo ..	20	13	7	4	2	7	7	9	0	2	7	2	2	12	0	6	6		
10	Estonio ..	3	1	2	0	2	1	0	0	0	2	1	0	1	1	0	1	1		
11	Finnlando	9	9	0	2	5	2	0	1	0	5	1	2	0	2	0	0	7		
12	Francujo..	128	94	34	7	45	54	21	36	1	23	49	20	2	63	2	61	61		
13	Germanujo	115	91	24	13	36	42	18	30	6	23	48	14	10	65	0	40	40		
14	Hispanujo	28	26	2	3	17	6	2	11	0	8	8	1	1	16	0	11	11		
15	Hungario	2	1	1	0	1	0	1	0	0	1	0	1	0	0	0	2	2		
16	Indonezio	2	2	0	1	1	0	0	0	0	1	1	0	0	1	0	1	1		
17	Irlando ..	1	1	0	0	1	0	0	0	0	0	0	1	0	0	0	1	1		
18	Islando ..	6	5	1	0	5	1	0	2	0	2	2	0	0	3	0	3	3		
19	Italujo ..	22	17	5	4	9	7	2	3	0	2	11	6	3	9	0	10	10		
20	Japanujo..	4	4	0	0	2	2	0	0	0	2	0	2	0	0	0	4	4		
21	Javo ..	1	1	0	1	0	0	0	0	0	1	0	0	0	0	0	1	1		
22	Jugoslavujo	46	30	16	2	26	16	2	10	0	13	14	9	2	34	0	10	10		
23	Kanado ..	1	1	0	0	0	1	0	0	0	0	0	1	0	0	0	1	1		
24	Kubo ..	2	2	0	0	2	0	0	1	0	1	0	0	0	1	0	1	1		
25	Latvujo ..	1	0	0	0	0	0	1	0	0	0	0	1	0	0	0	1	1		
26	Libano ..	1	1	0	0	1	0	0	0	0	0	0	1	0	0	0	1	1		
27	Madagaskaro	1	1	0	0	1	0	0	0	0	1	0	0	0	0	0	1	1		
28	Nederlando	122	70	52	5	48	43	23	27	3	46	47	2	3	78	11	30	30		
29	Norvegujo	10	9	1	2	1	3	4	4	0	0	6	0	1	3	0	6	6		
30	Novzelando	3	3	0	0	2	1	0	0	0	2	1	0	0	1	0	2	2		
31	Polujo ..	1	1	0	0	0	1	0	1	0	0	0	0	0	0	0	1	1		
32	Portugalujo	9	9	0	0	6	3	0	1	0	1	6	1	0	2	0	7	7		
33	Saarlando	6	6	0	0	6	0	0	2	0	0	4	0	0	1	0	5	5		
34	Sovetunio	5	3	2	0	2	3	0	0	0	0	5	0	1	0	0	4	4		
35	Svedujo ..	44	32	12	2	20	12	9	27	1	10	6	1	0	29	6	15	15		
36	Svisujo ..	10	9	1	1	4	3	2	1	0	0	8	1	0	0	0	4	4		
37	Ukraino ..	1	1	0	1	0	0	0	0	0	1	0	0	0	0	0	1	1		
38	Usono ..	8	8	0	2	3	3	0	1	0	2	4	1	0	1	0	7	7		
	Sumo	933	663	270	80	390	314	129	238	20	264	326	105	39	506	16	372	372		
	En procentoj (%)	100	71	29	8.5	41.9	33.7	13.8	25.5	2.1	28.5	35	11	4.2	54.2	1.6	40	40		



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur 21-XII). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Via Vittorio Veneto 56, Roma, Italujo.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.30	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

RADIO ROMA

Programo de Decembro 1953

Merk. 2an.	Novaĵoj el Italujo.
Ven. 4an.	Oratorio "La Mesio" de Händel.
Merk. 9an.	Romaj kanzonoj.
Ven. 11an.	Zamenhof, okaze de la 94a datreveno de lia naskiĝtago.
Merk. 16an.	Esperanto en la praktiko.
Ven. 18an.	Respondoj al la geaŭskultantoj, kaj bibliografio.
Merk. 23an.	La Sankta Kripo.
Ven. 25an.	La Kristnasko.
Merk. 30an.	La fablo-verkisto : Trilussa.

Lasthore ni eksciis, ke ĉiuj elsendoj el Radio S.E.U. en Madrid ĉesis pro reformo de la stacio. Ni informos pri rekomenco de la programo *Anteno Esperantista* tuj, kiam ĝi okazos.

ESPERANTO

1953

46a Jaro

Redaktoro : HANS JAKOB

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Administracio :

HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO

Serva Oficejo :


PALAIS WILSON, GENÈVE, SVISLANDO

I N D E K S O

	paĝo
Akademio de Esperanto	191
Analogiaj komparoj faritaj de D-ro Zamenhof : <i>T. K. Slade</i> ..	346
An Tóstal (Irlanda Printempa Festo)	29
Bibliotekoj, Esperanto-literaturo en	188
Canberra : <i>Kent Hughes</i> (<i>R. L. Harry</i>)	69
C.E.D. 10, 52, 93, 135, 183, 188, 222, 279, 325, 355	
Cemento, Portland : <i>M. de Waard</i>	24
Ĉefartikolo 1, 49, 81, 113, 145, 177, 209, 241, 273, 313, 345	
Ĉeĥo en Islando : <i>O. Ginz</i>	137
Dazipo de Brazilo : <i>E. Linz</i>	341
Digoj, polderoj kaj inundoj, Pri : <i>M. de Waard</i> ..	231, 268
Disciplino, Kio estas ? : <i>M. Stuttard</i>	67
Distro, Por via	122
Eksperimentoj en lernejoj, Lastatempaj : <i>V. C. Nixon</i> ..	56
En Eŭropo, Ameriko, Azio kaj Afriko : <i>I.G.B.</i> ..	116
Esperantismaj Problemoj : <i>H. Jakob</i>	182, 314
Esperanto en Praktiko : <i>L. Friis</i>	274
Estetika aprezo de lingvoj, Pri : <i>J. Tuwin</i>	99
Elementoj kiuj karakterizas bonan Esperanto-stilon : <i>Lamond</i> ..	136
En Indonezio, lingvaj malfacilaĵoj : <i>M. de Waard</i> ..	366
Estraro de U.E.A., Kunvenis la : <i>H. Jakob</i>	145
Fenomeno de Esperanta Literaturo : <i>R. Rossetti</i> ..	193
Fiska Simfonio : <i>W. A. Gething</i>	43
Florbulboj, ankaŭ en via ĝardeno	299
Fondaĵo Montevideo : <i>E. Malmgren</i>	178, 275
Forumo, Nia 20, 92, 128, 156, 192, 229, 266, 288, 362	
Fremda Semo, La : <i>F. G. Rayer</i>	31
Fremda lingvo en lernejoj	157
Geedziĝoj 9, 72, 117, 158, 205, 242, 365	
Gefianĉiĝoj 112, 158	
Glacirikolto : <i>R. E. Fairbairn</i>	36
Glavo de la tombloĝanto, La : <i>B. Ragnarsson</i> ..	169
Grotoj, Kion ni serĉas en : <i>M. Gjivoje</i>	147
Grupojn niajn, Kiel vigligi : <i>A. Albault</i>	88
Haarlem kiel kongresurbo : <i>J.R.J.</i>	285
Hodler, Ferdinand : <i>H. Jakob</i>	95
Homo kaj la Aŭtomobilo, La : <i>H. Parland</i> (<i>T. Morariu</i>) ..	171, 216
Internacia festo de kandeloj : <i>J. Heath</i>	59, 242
Inunda katastrofo : <i>J. P. van Dijk</i>	162
Jubileoj 64, 72, 95, 151, 215, 216, 278	
Jugoslavujo : <i>D-ro I. Borovečki</i>	119

	paĝo
Kampado : <i>G. Agricola</i>	364
Kongresoj kaj kunvenoj (nenaciaj) :	
Fervojista .. 214	Lingvaj malfacilaĵoj en 280, 296, 326
I.L.E.I. 324	Mondfederalista 281
Katolika .. 318	S.A.T. 270
K.E.L.I. .. 115	39a U.K. (Haarlem) .. 285, 323, 352
38a U.K. (Zagreb)	
12, 13, 15, 16, 49, 61, 89, 118, 146, 185, 209, 220, 243, 273, 342	
Konkursoj :	
Belarta 37, 54, 98, 184, 286, 299, 300, 304, 339, 347, 350	
Enigma 44, 77, 108, 142, 174, 207, 240, 310, 343, 370	
Internacia .. 48, 51, 87, 116, 117, 166, 188, 210, 311, 340, 372	
Oratora 131, 133, 146	
Kotizoj 1954 312	
Landaj Asocioj, La roloj de : <i>D-ro P. Kempeneers</i> 217	
Lando de Kasteloj, En la : <i>E. Motillon</i> 289	
Legendo de la preĝejo surmonta : <i>M. Toorneman</i> 28	
Literaturo, Krizo de nia : <i>D-ro I. Lapenna</i> 82	
Londona Klubo jubileas 215, 268	
Luphomoj de Sudameriko : <i>E. Linz</i> 297	
Marŝalo Tito kaj Esperanto 221, 265	
Mason Stuttard, 50-jara : <i>Bo-Bo</i> 64, 221	
Membraro nia : <i>C.C.G.</i> 86, 216	
Mi eskortis la Reĝinon : <i>Majoro T. C. Hawley</i> 235	
Mistera Paketo : <i>D. Takać</i> 21	
Moderna Fabelo : <i>M. Lewin</i> 75	
Mortintoj niaj .. 72, 112, 117, 158, 205, 210, 242, 278, 337, 365	
Naskiĝoj 9, 72, 112, 117, 158, 205, 210, 278, 337, 365	
Nederlando, Kongreslando 1954 : <i>H. Bakker</i> 353	
Nokta Horo, En : <i>F. Timmermans (C. F. W. Slijper)</i> 291	
Oazo en danĝera vivo : <i>P. Heinrich</i> 196	
Oficiala Informilo .. 47, 79, 110, 143, 176, 208, 239, 271, 311, 344, 371	
Perŝipe laŭ Adriatika marbordo : <i>L. Borčić</i> 62	
Pliboniĝo de nia informado, Grava : <i>D-ro I. Lapenna</i> 222	
Poezio 9, 50, 54, 134, 135, 169, 187, 238, 294, 299, 347, 369	
Poezio de la Eskimoj : <i>P. Thorsen</i> 331	
Poezio—Muziko : <i>S. Urban</i> 35	
Porketo, La : <i>F. Timmermans (F. W. Slijper)</i> 292	
Radio .. 46, 78, 109, 141, 170, 175, 186, 206, 228, 264, 309, 338, 358	
Radio-Zagreb, Esperanto ĉe 186	
Raportoj pri :	
Esperantlingvaj resumoj 85	Infandesegnaĵoj .. 74
Fervojistoj .. 211	K.E.L.I. .. 115
I.F.E.S.A. .. 115	Sveda Somera Semajno 53, 349
I.L.E.I. ... 23, 184, 324, 361	

	paĝo
Rondo Familia, La : <i>E. de Wolf</i>	165
Satiro : <i>E. A. Haugen</i>	167
Seksĉeloj de Chlamydomonas, Konduto de : <i>R. A. Lewin</i>	73
Senhejmulo : <i>R. J. French</i>	300
Silenti kaj Paroli : <i>D-ro J. C. A. Fetter</i>	76
Sinjorino kiu kredis, La : <i>G. C. Jervis</i>	304
Socia konsisto de la Esperanto-Movado, Enketo pri la	325
Sonimitaj vortoj : <i>A. Sauvageot (H. Castel)</i>	327, 356
Sorĉrompisto, La : <i>E. Linz</i>	368
Spegulo de Nuntempo..	317
Strangaj bestoj en Aŭstralio : <i>P. E. Schwerin</i>	103
Susak, kurioza Adriatika sablo-insulo : <i>M. Gjivoje</i>	90
Taso da Teo : <i>E. de Burgh Daly</i>	37
Topografia kaj historia unikaĵo : <i>F. Schwarz</i>	97
Tra la Libraro ..	30, 65, 123, 159, 189, 269, 282, 329, 359
Tra la Mondo Esperantista :	
Argentino ..	348
Aŭstralio ..	318
Aŭstrujo 84, 155, 179, 276	
Belgujo ..	84, 211
Brazilo ..	149, 179
Britujo ..	212, 276, 318
Ĉeĥoslovakujo ..	179
Danlando 84, 114, 149	
Francujo ..	84, 276
Germanujo ..	115, 149
Grekujo ..	213
Hispanujo	
78, 141, 149, 179, 213, 319	
Islando ..	170
Italujo 85, 150, 213, 277, 309, 319	
Japanujo ..	320, 348
Jugoslavujo 141, 180, 213, 348	
Nederlando ..	84
Norvegujo ..	213, 277
Nov-Zelando ..	85, 150
Portugalujo ..	213, 348
Saarlando ..	181
Salvadoro ..	114
Slovenujo ..	115
Svedujo 53, 74, 150, 181, 277, 321	
Svislando ..	46, 150, 322
Urugvajo ..	349
Usono ..	150, 278, 349
UNESKO :	
Parolado de D-ro Lapenna 7	
Pri la rezolucio ..	2-6
Debatvespero ..	10
Esperanta terminologio ..	153
Fondaĵo Montevideo ..	178
Diversaĵoj ..	23, 52, 183
Unuiĝintaj Nacioj, La Tago de la : <i>D-ro I. Lapenna</i>	293
Veteranoj ..	78
Vetero, Luno kaj Planedoj : <i>D-ro Hess (W. Kohler)</i>	295
Vivo Virina ..	140
Zagreb—Impresoj : <i>M. Stuttard</i>	17
Zamenhof, Biografioj pri D-ro ..	130
Zamenhof, Pri poemoj de ..	193, 322
Zamenhofa Monumento, La : <i>I. Dratwer</i>	351



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***La Junaj Detektivoj**, originala porinfana novelo de J. H. Sullivan, kun ilustraĵoj de Brenda Goodwin. 43-paĝa, 18×12.5 cm., broŝ. Prezo 2 ŝil., afranko 2 pencoj. Eldonis The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Herts., Anglujo.

En la antaŭparolo la aŭtoro diras, ke “la libreto estas verkita precipe por tiuj geknaboj, kiuj lernas Esperanton en lernejoj, kvankam ĝi servos egale por aliaj, kiuj aliloke lernas la lingvon... Laŭ mia sperto, ne plaĉas al ili rakontoj pri infanetoj, kiuj ludas per pupoj k.t.p., nek pri kulturaj temoj; sed preskaŭ ĉiuj ŝajnas ami historiojn pri kontrabandistoj, ŝtelistoj, subteraj tuneloj, k.t.p.”

Tiu ĉi originala rakonto estas ja tre bonvena, ĉar de antaŭ longe estas rimarkite, kiom mankas al ni legolibroj taŭgaj por geknaboj. En la nuna verkaĵo, la aŭtoro sukcesas pri la du kvalitoj por certigi la akcepton inter lernejoj, t.e. la simpleco de lingvo kaj la elekto de temo interesa al la nuntempa infano (vidu supre la elĉerpaĵon el la antaŭparolo).

Laŭ lingva vidpunkto la libro estas preskaŭ nekritikebla. Nur du punktojn mi rimarkis—la iom anglan uzon de *iu* en la esprimo *en iu okazo* (ĉiuokaze) meze de paĝo 21 kaj sur paĝo 39, kaj la ellason de la vorto *la* antaŭ *ĵaŭdo* sur paĝo 22. Tre kontentige estas rimarki, kiom malofte enestas participaj formoj—sendube la plej malfacila ero en la

studado de la lingvo por geknaboj (kaj plenaĝuloj!).

Senhezite mi povas rekomendi la libron al la atento de ĉiuj, kiuj instruas la lingvon, kaj aparte al tiuj, kiuj provas Esperantistigi geknabojn. [Persona noto: ĝi pruviĝis tre efika tiurilate en mia propra hejmo. Kiam mi volis pretigi ĉi tiun recenzon la libro estis malaperinta. Mia 14-jara filo prunteprenis ĝin por kaŝe (kaj verŝajne tre avide) tralegi ĝin!]

W. M. Goodes.

***Faktoj pri Norvegujo**, redaktita de Johs B. Hagna, Ragnar Wold kaj Finn Magnus, tradukita de Hans Amund Rosbach (Chr. Schibsteds Forlag, Oslo 1953). 64 paĝoj, 17×12.5 cm., broŝ. Prezo 3ŝ. 9p., afranko 3p.

Jen libro el speco, kiu tre plaĉas al mi: ĝi utiligas Esperanton por praktika celo. Praktika kaj tamen konforme al la Esperantistaj deziroj: interkonigi popolojn. Ĉi-okaze la libro donas informojn kaj faktojn pri la norvega popolo.

En koncizaj ĉapitroj, ilustritaj per klaraj bildoj, la leganto estas instruita i.a. pri la geografio, la administracia kaj sociala sistemoj, pri la historio kaj la kulturo de Norvegujo.

La originalo de la libreto, kiu verŝajne estas tradukita en pluraj lingvoj, estas Esperantigita de Hans Amund Rosbach en simpla, afer-tona lingvo, sen gramatikaj strangaĵoj. Kelkajn ne tre ĝenajn komposterarojn

oni certe evitos en eventuala dua eldono.

Mi esperas, ke nia movado montros sin inda al tiaj eldonoj de ne-Esperantistaj entreprenoj, rapide aĉetante la tutan eldonkvanton.

M. de Waard.

***Zamenhofs Legolibro**, kompilita de M. Kidosako. Eld. Japana Esperanto-Instituto. 18 × 12.5 cm., 108 paĝoj, broŝ. Prezo 3 ŝilingoj, afranko 3p.

“Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate, imiti kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton”. Tiel oni legas en la Deklaracio pri Esperantismo, represita en ĉi tiu libreto. Tiuj vortoj unue aperis en 1905. De tiu jaro la lingvo ja evoluas; en la verkoj de Zamenhof troviĝas esprimoj arkaiĝintaj—ne plu ni tiel adas kaj eĉas—tamen en tiuj verkoj ankoraŭ fontas la esenca spirito de la lingvo. Ni, kiuj konas la majestajn frazojn, sentas la devon ilin konigi al la progresanto. Jen altiĝas problemo: kiun verkon rekomendi? Ĉu la *Paroladojn*? Sed de longe ili ne estas haveblaj en aparta broŝuro. Nun danke al niaj japanaj samideanoj venas ideala solvo: Zamenhofs legolibro, kies enhavo ampleksas pecojn el la originalaj kaj tradukitaj verkoj. Gustoj diferencas, tamen la pecoj, kiujn la kompilinto elektis, estas pli-malpli tiuj, kiujn mi elektus. Certe mi inkluzivus la pecojn el *Genezo*, *Hamleto*, *Pri la Deveno*, kaj la kvin *Kongresaj Paroladoj*. En la fino de la libreto troviĝas utila listo de

verkoj Zamenhofaj kaj pri-Zamenhofaj.

Ĉi tiu libro fakte estas represo (sen la tria parto) de verko jam eldonita en 1931, sed ĉar tiu estas de multaj nekonata, la nunan eldonon ni traktis kiel novan verkon.

C. D. A. Capp.

La arto fariĝi centjara, de Ludwig Wegener. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo. 18.5 × 12 cm., 60 paĝoj, broŝ. Prezo ne montrita.

Jen alloga titolo por la Esperantisto, kiu avidas tempon por verki kaj vojaĝi. La arto baziĝas sur la nutraĵreformo. Laŭ tiu skolo la senvianda manĝado ne sufiĉas por la bona sano, kaj eĉ multaj vegetaranoj, pro tio ke ili manĝas tro da rafinitaj faruno kaj sukero, ne atingas viglan maljunagecon. D-ro Wegener ne estas fanatikulo, tamen mi bedaŭras, ke li ne pli ruze predikis sian evangelion, ĉar lia libro ne facile konvertos la ortodoksulojn — la proponita dieto postulas grandan rompon de la kutimo. La verkinto prave emfazas la valoron de krudaj vegetaĵoj, sed ŝajnas al mi, ke anstataŭ malaprobi la kuiradon, al kiu homoj de longe kutimiĝis, estus konsilinde instrui al ili kiel konserve kuiri legomojn per malmulte da akvo. Al la civilizita homo la manĝado ja estas io alia ol la nura nutrado, kaj eĉ salaton oni devus arte prepari por plaĉi la okulon kaj tikli la palaton. Tamen mi ne volas turni iun for de ĉi tiu pensiga verko; kontraŭe mi esperas, ke ĝi kondukos multajn sur la vojon al longa kaj vigla vivo.

La lingvo estas klara kaj malpeza, kvankam du-tri vortoj havas pli vastan signifon, ol kutime (*kosmetiko*, *digesto*). Anstataŭ *bulbo* me preferus

cepo (ne ĉiu bulbo estas bongusta). Sur p. 39 troviĝas evitinda uzo de *domaĝoj* (*difektoj* aŭ *damaĝoj*). Presado kaj papero, kiel kutime ĉe ĉi tiu eldonejo, estas bonaj.

C. D. A. Capp.

***Kial ekzistas poeto plia kaj kamp-laboristo malplia** de Antonio de Trueba. Trad. Leandro Taccani el la hispana lingvo. Eldonita de la tradukinto. 40 paĝoj, 17×12 cm., broŝ. Prezo 2ŝ., afranko 2p.

En Hispanujo dum la tridekoj de la lasta jarcento okazis milito inter la partianoj de la Reĝino Izabelo kaj tiuj de la pretendanto, Don Carlos. Ĉi tiu verko temas pri epizodo de tiu terura malpaciĝo—pri junulo, kiu forkuris el armeo, kies kruelajn agojn li ne povis partopreni.

La tradukinto opinias “ke Esperanto . . . povas lasi neŝanĝita la formon de esprimo uzitan per la lingvo originala, ĝuste ĉar ĝi estas teoria lingvo, kiu permesas la aplikon plej kompletan de la pluraj strukturoj gramatikaj”. Tio ignoras la fakton, ke Esperanto havas sian propran spiriton, kaj sekve en la traduko la lingvo emas trudi sin sur la leganton je la malprofito de la historio mem. Tamen eĉ tiel la novelo estas leginda.

C. D. A. Capp.

***ILP English-Esperanto Calendar 1954.** Kompilis kaj eldonis la Sendependa Laborista Partio en Britujo. 56 paĝojn 11 × 17 cm. 2ŝ. 6p. afr. 3p.

Ampleksa pendkalendaro bele presita sen politikaj aludoj. Unu semajno prezentiĝas sur ĉiu paĝo, kun tagnomoj en angla lingvo, sed akompanaj devizoj en lingvoj nacia kaj internacia.

INSTRUISTOJ

Observanto por ILEI ĉe la Mond-konfederacio de Organizaĵoj de la Instruista Profesio en Oxford, Anglujo (31 Julio ĝis 4 Aŭgusto 1953) Fino Ferriman, raportas, ke la Konferenco estis treege interesa kaj lumiga, kvankam iom teknika, ĉar multe da tempo nepre dediĉiĝis al organizaj aferoj.

La Konfederacio reprezentas 3 milionojn da geinstruistoj en 33 landoj. La Brita Ministro por Edukado, F-ino Horsburgh, alparolis la Konferencon. Ŝi ĝojis, ke la ĉefa temo por diskutado estas “Asocioj por Gepatroj kaj Geinstruistoj”. Ŝi urĝis, ke la geinstruistoj malaperigu plue la ideon, ke tio, kio okazas en la lernejo estas mistero komprenebla nur de la iniciintoj. Dum la Konferenco, interpretistoj tradukis francan el la angla lingvo kaj inverse.

* * *

ILEI forte rekomendas, ke lernejoj geinstruistoj, kiuj deziras aranĝi nun aŭ estontece interkorespondadon aŭ laŭklase aŭ individue, registru sin nun, kun 1 rpk kaj precizaj detaloj pri aĝo, grado kaj komencdato ĉe F-ino Tegg, 258 Victoria Road, Ruislip, (Middlesex) Anglujo, kiu havas atendantojn en sia sliparo.

Arboj de la Arbaro kaj Kampo de Frank Booth



Trafe ilustrita libreto pri arboj de Norda Eŭropo.

40 paĝoj - - 1 ŝil.

Mendu ĉe U.E.A.



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Praktika uzado de Esperanto

Kvankam juna Esperantisto, mi ĉiam celas uzi *praktike* nian duan lingvon. Tion mi jam sukcesis fari en dek diversaj landoj (kaj intencas daŭrigi tiun direkton!) Loka gazeto kun 70.000 ekzempleroj ĉiutage akceptis presigi miajn vojaĝnotojn kaj Esperanto-artikolojn.

Pro tio, mi preferus ke *Nia Forumo* enhavu similajn praktikajn rezultojn, anstataŭ longajn diskutojn inter (ne)-akademianoj pri vortoj (ekz. UNO kaj UNESKO). Ĉu la akademianoj ne povus diskuti pri tiuj problemoj *private*?

Mi opinias, ke nur la *rezulto* de tiuj necesaj diskutoj interesas la junajn, kaj ĝenerale ĉiujn aktivajn, Esperantistojn.

Lucien Giloteaux, Francujo.

Vojaĝado kaj la Delegitaro

Ŝajnas al mi, ke la Esperantistoj ankoraŭ nur en eta grado ektrovis, ke ankaŭ se ili tute *private* vizitas fremdan landon, ili havas bonan utilon de Esperanto. Iu malnova kaj ne malaktiva samideano antaŭ nur kelkaj semajnoj plendis al mi, ke li aŭtomobile travojaĝis Eŭropon ĝis Vieno kaj ne rekontis eĉ unu Esperantiston. Kompreneble ne! Tiel multaj ni ankoraŭ ne estas. Sed kial oni ne uzas la adresaron de UEA? Eĉ se oni mem aranĝas hotelĉambron

kaj ĉion alian, oni tamen povas sin turni al la delegito kaj demandi, ĉu li ne povus peri kontakton kun iu aŭ iuj Esperantistoj kiam oni je tiu kaj tiu dato troviĝos en lia urbo. Se temas pri grandaj turistcentroj oni eble estu iom singarda kun tiaj petoj, sed se temas pri malgrandaj lokoj, la delegitoj tutcerte kun ĝojo uzus tiun okazon iomete helpi al eksterlandano.

Mi volas menci, ke mi faris en aŭgusto ĉijare libertempan vojaĝon al Francujo. Mi troviĝis tie ĝuste dum la fervoja striko, kaj fakte devis peti la Esperantistojn pri iom pli da helpo ol mi alie farus. Sed mi kun ĝojo konstatis, ke mi ricevis netakseble valoran helpon en Parizo, unue de la delegito por turismo, kiu antaŭe mendis por mi hotelĉambron, kaj due de fraŭlino en la centra oficejo de UEF. Poste en Grasse de la delegitino kaj ŝia edzo kaj en Nice de la sekretario de la Esperantoklubo kaj pluraj aliaj samideanoj. Esperanto do funkciis bonege, kaj denove mi spertis, ke oni facile povas vojaĝi en fremda lando, utiligante la eblecojn de la movado.

Por eviti miskomprenon, mi aldonu, ke mi celas la laŭstatutan uzadon de la delegita servo, ne la provojn senpage gastigi je Esperantistoj k.t.p., pri kiu oni de tempo al tempo legas plendojn en la Esperanta gazetaro.

Åke Blomberg, Svedujo.

Scienca Literaturo

En via junia numero S-ro Wagner opinias, ke ni ne bezonas sciencajn verkojn ĉar oni povus studi sciencon pli facile en la propra nacia lingvo.

Pro tio mi demandas, kial estu lingvo internacia? Mi mem ne estas sciencisto, sed kamparano kiu flanke interesiĝas pri la abelbredado.

La angla literaturo, kvankam bona, tute ne sufiĉas por serioza studado, do oni estas devigata aĉeti gazetojn kaj librojn de Usono, lando en kiu troviĝas multe da komercaj miel-produktantoj kiuj feliĉe vendas en la sama lingvo kiel nia.

Sed eĉ tio iom mankas, ĉar estas du Rusoj kies artikoloj, kvankam tre gravaj, ricevas nur mallongan recenzon en la anglalingva gazetaro, dum la studado de mondkonata svisa sciencisto aperas nur en tradukita formo.

Pri la lingvo de la abeloj unikan kontribuon faras germana profesoro Frisch, kaj forpasis jaroj ĝis kiam Usonanoj restudis kaj eldonis anglalingve liajn plenajn konkludojn.

Certe ni bezonas detektiv-romanojn por nin distri dum libera horo, sed kien ni iru se ni ne eldonu kiel eble gravajn fak-verkojn?

T. J. Woodall, Britujo.

Dankon, koran dankon !

Pasis jam pluraj monatoj post la aĉeto de mia alvoko. Vi certe memoras la artikolon: *Nia rondo familia* en la maja numero de *Esperanto*, en kiu mi priskribis la mizeron en kiu S-ro Maas troviĝis pro la katastrofo de la 1a de februaro.

La alvoko ne restis sen rezultato. El preskaŭ ĉiuj landoj venis la mendoj. El Eŭropo, Afriko, Aŭstralio kaj Ameriko venis kortuŝaj esprimoj de

kompreneo kaj kunvivo. Volonte, tre volonte, S-ro Maas volus danki al ĉiu persone, sed tio ne estas ebla. Tial S-ro Maas komisiis al mi danki vin ĉiujn en lia nomo pro la helpo kiun li ricevis. Kompreneble la domaĝo estis multe pli granda ol la sumo kiun li ricevis, sed la nura gesto, kaj precipe la koraj vortoj kiujn pluraj samideanoj sendis al li, kuraĝigis lin kaj tuŝis lin. Li certe ne forgesos vian oferon, vian helpon. La tuta sumo ricevita estas pli ol f. 300.00.

Karaj samideanoj, mi aldonas ankaŭ mian koran dankon pro via helpo. Montriĝis, ke en la mondo esperantista vivas la nobla sento de samideaneco.

E. de Wolf,

Delegito en Haarlem,

Nederlando.

Prospektoj en Esperanto

Kiam samideanoj klopodas ĉe oficialaj instancoj pri eldono de prospekto en Esperanto certe utilis memori, ke la organizantoj de la Universala Kongreso volonte enmetas turismajn kaj alispecian prospektojn en la paketojn de "Kongresaj dokumentoj" kiujn ricevas ĉiu kongresano. La diversaj dokumentoj devas ricevi la aprobon de U.E.A. sed tiu volonte aprobas dokumenton tian. Kondiĉo estas nur, ke la lingvo estu Esperanto. La organizantoj povas ĉiujare uzi ĉirkaŭ dumil ekzemplerojn. Tio jam garantias vastan reklamon por la koncerna prospekto. La servo estas senpaga.

K.K.S.

G. Agricola :

Kampado

NOVA vorto? Jes kaj ne. Ĝi ekzistas jam de kelkaj jaroj en la naciaj lingvoj, sed ĝenerale oni uzas la formon *Camping*, t.e. vivi en kampo, arbaro, montaro, kaj prefere en tendoj (sen tento!). Kiom alloga estas ja forlasi tiun-ĉi supercivilizitan vivadon kaj ĝui duonciganan vivon! Kiel ĉia plezuro ankaŭ tiu-ĉi havas siajn malbonajn flankojn kun kiuj mi konatiĝis jam forveturante. La dorssako, superplena, surhavis la dormsakon similantan je groteska kolbaso, sur ĝi poto el kies internaĵo sonis harmonie la manĝilaro, forko, tranĉilo, kulero. Krome mi portis mian propran domon (tegmento kaj vandoj ruligitaj) ne pli ol ses kilogramojn pezan, sen kelo kaj sen ĝardeno.

Rigardante de malantaŭe oni povis konstati mian homecon nur de la genuoj ĝis la piedoj, la resto estis kovrita de tiu ĉi dorssak-ŝvelo, pendanta dekstren kaj maldekstren, tiel ke estis malfacile supozi sub tia monstro homan ekziston.

Sed kun suverena sinteno mi malatentis la rigardon plenan je moka aŭ kompatato de miaj kunhomoj. Iĝis problemo tamen, eniri tramon. Mi sentis min kiel testudo, puŝanta kapon el truon kaj ne povanta kompreni, ke la larĝa korpo ne povas sekvi. La konduktoro vokis "Rapidu, rapidu, ni jam malfruas". Mi puŝis kaj tiris kaj fine ne plu povis moviĝi nek antaŭen nek malantaŭen, ĝis aro da nekonataj sed helpemaj manoj liberigis min el tiu ĉi situacio, deprenis la sakon kaj ŝovis ĝin, sen la posedanto, en la vagonon.

Tagon poste mi jam troviĝis ie en la naturo ĉe Mediteranea Maro. Mia

domo staris sub giganta pinio, kiu donis ombbron. Fiera esti trovinta tiom belan lokon, mi preparis mian dormsakon por fari *Siesta* kaj tuj alkutimiĝi je la suda vivritmo. Laca de la vojaĝo mi baldaŭ endormiĝis.

Sed jen. Subite mi vekiĝis, revinte ke mi falis en boskon de urtikoj. Kruroj, stomako, brusto, ĉio brulis nekredeble. Mi eksidis kaj konstatis kun surprizo, ke la formikoj venis sur mian korpon por kermeso. Mi forpelis tiujn ĉi neinvititajn gastojn kaj kuŝiĝis kelkajn metrojn pli malproksime. Mi ree vekiĝis sekve de forta frapo sur frunto. Timigite, mi rigardis, memorante la okazajn atakojn je turistoj en tiu ĉi benata terparto. Sed estis nur konuso de pinio, kiun mi malbenis pro la timo kiun ĝi estis kaŭzinta.

Mi deicidis transloĝiĝi en la tendon. Mi provis levi la matracon, sed ĝi ŝajnis esti gluita al la tero. Mi senzorge ĝin estis metinta sur abian rezinon kaj eĉ pezigis ĝin per mia korpo, por ke ĝi fiksiĝu ankoraŭ pli serioze. Fine mi sukcesis ĝin levi kaj puŝi en la tendon. Pacience mi atendis la dormon, sed post kvaronhoro estis tiom varmege, ke mi devis nevole memori je mia lasta Saunobano. Mi malfermis la tendon kaj fine dormis; kiom longe mi ne scias. Mi nur memoras ke mi subkonscie songis pri la milito, pri bomboj kaj aviadiloj. Mia tendo transformiĝis en sportejo kaj flughaveno. Muŝoj, tabanoj, ekzercis sur min kaj boris kvazaŭ mi estus oleokampo. Araneo imagis al si esti en cirko kaj balancis de la frontono de mia tendo; du nigraj kornumitaj skaraboj enamiĝis, lacerto rapidis de unu angulo al alia,

miriapodoj dancis rumbaon kaj la formikoj jam fondis tendoklubon.

Ekstreme honorigita per ĉi tiuj vizitoj, mi tamen preferis forkomplimenti ĉi tiujn gastojn.


Mi decidis fari kafon. Nur nun mi konstatis, ke mankas akvo. Armita je akvujo mi ekmarŝis kaj fine trovis post horo en vilaĝo cisternon, sen akvo. Mi decidis eniri la vilaĝan kafejon kaj gustumi ian brunan nedefinitan sukron kun la alnomo "kafo".

Dumnokte venis alia gasto, la Mistralo, kiu ne lasis min dormi. Ĝi skuis la piniojn, ĝi skurgis la maron. Ĝi tiris kaj tiris ĉiudirekte mian tendon. Je la mateno la vento laciĝis kaj la cikadoj ekprovis siajn instrumentojn, kaj je la unua sunradio ekkomencis la tuta ĥoro, tiel ke tra tiu ĉi frakasado ne plu estis eble dormi.

Mia restado daŭris tri semajnojn. Ĉiutage mi serĉis akvon kaj pli kaj pli mi iĝis malpura, sovaĝa. Mi vivis de piniokerno kaj fruktoj, de kondensita lakto kaj pano malmola, de olivoj kaj de bulboj, sed revis pri bifstekoj kaj frititaj terpomoj. Poŝton mi ne ricevis, ankaŭ ne gazeton. Mi estis forlasita, ekzilita kaj mi devis vivi sen meteorologia informado. La supro estis, ke nekonata vizitanto forprenis parton de mia mono. Li ankaŭ trovis tre taŭga mian horloĝon kaj la ilon por malfermi skatolon de konservaĵoj.

Vi ja povas imagi, ke mi scios konkludi post tiaj spertoj kaj aranĝi mian libertempon sekvontan.

Jes, mi ree tendumos !



ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Carlén. Al Rut kaj Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo naskiĝis filo la 23an de oktobro, 1953.

Labit. Al Ges. Labit-Rey (Prof. Labit, VD de UEA en Lille, Francujo) naskiĝis ĝemelinoj Françoise kaj Monique la 29an de oktobro, 1953.

Larsen. Al Eeva kaj Viktor Larsen (adr. Somero, Finnlando) naskiĝis filo, Torsti Andreo, la 2an de septembro 1953.

Geedziĝoj

Björk-Mäkelö. Je la 19a de septembro, 1953 samideanino Martta Björk kun S-ro Vukko Mäkelä en Heinola, Finnlando.

Amôlia-Egdé. La 18an oktobro D-ro Rama Egdö kun F-ino Maria Amélia Mântua.

Al ĉiuj ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Bernardino, Ivo, fervora kaj vigla propagandisto inter lisbonaj tramistoj.

Brash. En septembro mortis fervora samideano kaj delegito de UEA Robert Brash, el Luton, Anglujo.

Lyndridge. Je 9a de septembro 1953 mortis Alfred Wheeler Lyndridge el Rayleigh, Anglujo.

Merrick. Je 17a novembro 1953 mortis Sinjorino M. C. Merrick, edzino esperantista de nia tre fervora blinda samideano en Shepperton, Anglujo, Bonvolu ne skribi leterojn.

Ridpeth. En novembro 1953 mortis S-ro T. H. Ridpeth, el Londono. Delonge samideano kaj membro de UEA.

Warnier, Georges. Pro aŭtomobila akcidento mortis Georges Warnier, el Parizo, je aĝo 69. Dum tre longa tempo li estis fervora kaj vigla samideano, Prezidanto de LKK en Parizaj kongresoj de 1932 kaj 1950.

M. de Waard :

En Indonezio : Lingvaj malfacilaĵoj ĉe la instruado

Iom da historio

KIAM en la fino de decembro 1949 la nederlanda reĝino subskribis la dokumenton pri sendependeco de Indonezio, ĉi tiu nova juna ŝtato ekstaris sur multaj terenoj antaŭ kaosa situacio. Pri unu el la multaj malfacilaĵoj mi donos tie ĉi priskribon: la lingva problemo por la instruado en la universitatoj.

La nederlanda kolonia regado kreis, estas vere, universitaton aŭ kelkajn altlernejojn en Indonezio, sed prenis por tiuj kiel modelon la nederlandan universitatan sistemon. La lingvo, en kiu la profesoroj instruis, estis la nederlanda lingvo. Nur malmultaj indonezianoj havis okazon studi ĉe la universitato: ĉefe la filoj de la supera klaso partoprenis tiun superan instruon. La altaj kostoj kaj la uzata lingvo, fremda al la filoj de la simpla popolo, estis bariloj por grandskala alfluo de studentoj indiĝenaj.

La laboro de la diversaj altlernejoj kaj fakultatoj, fonditaj inter 1920 kaj 1940, tute stagnis dum la japana okupado, kvankam la okupantoj permesis la remalfermiĝon de tiuj kolegioj, kiuj povus esti utilaj al ilia milita celo.

Tuj post la fino de la japana okupado la indonezianoj, sub gvido de la nuna ŝtata prezidanto Sukarno, deklaris sin jam sendependaj de Nederlando (17 aŭgusto 1945) kaj iom post tiu dato ili fondis sian propran universitaton: la Gadjah-Mada-Universitato en Jogjakarta. Ĝi estis tre kuraĝa ago en la tiama tre konfuza kaj malekvilibra situacio, sed precipe post la memstariĝo de Indonezio la studentaro rapide

kreskis—de 463 en 1949 ĝis 4457 en 1953. Apud la G.M.-universitato en Jogjakarta funkcias nun ankaŭ la Universitato de Indonezio en Djakarta; ĝi estas la daŭrigo de la institutoj el la nederlanda periodo en Batavia kaj Bandung.

Krom la du nomitaj ekzistas la islama universitato kaj kelkaj privataj aŭ specialaj akademioj.

La lingva problemo

La politiko de la registaro celas doni nacian karakteron al la tuta instrusistemo en Indonezio. Tio signifas, ke oni aspiras al ĝenerala enkonduko de la indonezia lingvo kiel lingvo de la instruado; tio signifas ankaŭ, ke ĉefe kaj unualoke la indonezianoj mem havu la eblecon kaj rajton esti nomitaj kiel profesoroj kaj membroj de la stabo universitata. Fine tio signifas ankaŭ ŝanĝojn en la instrumentado kaj en la instruata materio, por ke ĉio ĉi fariĝu harmonia kaj konforma al la postuloj de sendependa popolo kaj ĝiaj idealoj por la estonteco.

La plenumo de tiu programo ne estas facila. Unualoke oni sentas la malsufiĉon de la libroj en indonezia lingvo, uzeblaj de la studentoj. Kvankam pluraj libroj jam estas tradukitaj, ili ne sufiĉas kaj krome por la universitataj studentoj ja ne sufiĉas nur studolibroj. Do grandegaj malfacilaĵoj estas venkotaj.

Alia malfacilaĵo estas la manko de kompletaj vortaroj de teknikaj terminoj en la indonezia lingvo kaj multaj teknikaj esprimoj ankoraŭ ne estas ĝenerale uzataj. Tia plena vortaro de teknikaj terminoj estas

urĝe necesa por ĉiuj fakultatoj, sed antaŭ ĉio por la jura fakultato. Tio signifas, ke ĝis nun la uzantoj de universitataj libroj devas sin helpi per nederlandaj esprimoj. Sed la nederlanda lingvo estas konstante malpli uzata kaj instruata, sekve la junaj studentoj jam ne komprenas ĝin, do la kreo de indoneziaj teknikaj (=fakaj) terminoj estas nun tre urĝa.

Lingva Komitato, starigita de la ministro de Edukado kaj gvidata de la prezidanto de la literatura fakultato, prof, Prijono, havas la taskon traduki ĉ. 360 librojn el ĉiuj branĉoj de la scienco kaj krei (formi) teknikajn terminojn.

Por ĝuste plenumi sian taskon la Komitato ricevas helpon de lingvistoj kaj profesoroj de la diversaj fakultatoj. La Komitato eldonas revuon "Medan Bahasa", en kiu ĝi publikigas regule novajn vortojn kaj esprimojn.

Alia aspekto de la lingva problemo estas en la universitatoj—la ĉeesto de multaj lektoroj el fremdaj landoj, precipe nederlandanoj. Tion kaŭzas la fakto, ke dum la kolonia periodo nur malmultaj indonezianoj havis la eblecon akiri akademian gradon. Krome la plej multaj indiĝenaj intelektuloj estas en ŝtata servo (en diplomatiaj aŭ registaraj funkcioj). Multaj aliaj estas parlamentanoj aŭ superaj oficistoj.

Elektante eksterlandajn lektorojn la Registaro devas akcepti la fakton, ke la plimulto el ili ne scias doni siajn kursojn en la indonezia lingvo. Tamen, la Registaro trovis provizoran solvon de tiu problemo, pro kiu la studentoj ne estas ĝenataj en sia studo kaj pro kiu ilia studo povas progresi normale. La provizora solvo estas, ke oni permesas al la lektoroj fari siajn prelegojn en la *angla* lingvo,

sed iom post iom ili devos transiri al la uzo de la indonezia lingvo kiel instrulingvo. De la unua de januaro 1953 oni faras specialajn kursojn pri indonezia lingvo por la lektoroj de eksterlanda origino. Aliflanke la studentoj estas devigitaj partopreni intensive kursojn pri angla lingvo.

Por plifaciligi la efektiviĝon de tiu ĉi programo, la instruado de indonezia kaj angla lingvoj en la mezaj lernejoj estas plibonigenda. Pro tio la indonezia lingvo fariĝis la sole uzata lingvo en ĉiuj tiuj lernejoj ekde la unua de aŭgusto 1953. Antaŭ tiu dato oni instruis indonezie nur en la guberniaj (=por-indiĝenaj) lernejoj. Plue ĉiuj ekzamenoj okazos en tiu lingvo. Sola escepto estas nur la "Specialaj Mezaj Lernejoj", kiuj prizorgas la instruadon al specialaj grupoj da lernantoj, ricevintaj elementan instruon en la nederlanda lingvo. Ĝis la fino de la studojaro 1951-52 tiaj lernantoj rajtis fari sian abiturientan ekzamenon en la nederlanda lingvo. Por 1953 tiu permeso jam ne validas.

Konkludo

La registara politiko rilate al la instruado de kaj en la angla lingvo baziĝas sur la agnosko de tiu ĉi lingvo kiel plej grava "fremda" lingvo. Plue, ĉar la Registaro daŭre dungas docentojn de ne-indonezia deveno por la universitatoj, ĝisfunda kono de angla lingvo estas la ĉefa postulo por ĉiuj studentoj. Konkludo, cetere, pri kiu multaj Esperantistoj havas alian opinion

* * *

Multajn detalojn por tiu ĉi artikolo mi dankas al publikaĵoj de la Informa Servo de la Alta Komisaro de Indonezio en Hago, Nederlando.

M. de W.

Erika Linz :

La sorĉrompisto

IAM venis en nian bieneton viro, kiu rigardis per malgajaj malsanaj okuloj super malpurega ĉifono per kiu estis envolvita lia tuta malsupra vizaĝo.

“Ho, Joakino, kio estas al vi?” demandis mia edzo.

“Mi nepre mortos. Mia kapo estas plena de bestetoj,” estis la malgaja respondo. Li fortiris la tukon kaj montris terure ŝvelintan nazon el kiu fluis puso kaj rakontis, ke el ĝi kaj el lia orelo venas “vermoj”, kaj ke li suferas grandajn dolorojn.

“Sed homo, kial vi ne konsultas kuraciston?”

Li ridetis nekredeme kaj respondis: “Ĉar tio ne povas helpi al mi. Mi ne estas malsana. Mi estas ensorĉita. Kaj mi scias, kiu min ensorĉis.”

Aleksandro kompatis la iam tiel fortan kaj laboreman viron. Li deziris konvinki lin, ke nur kuracisto povas lin helpi. Tamen kiel tion atingi kun tiu superstiĉa cerbo? Sekvante subitan ideon li diris:

“Ĉu vi jam ekzamenis la aferon tiel ke ĝi tutcerte estas sorĉado?”

Mirigita rigardo.

“Ĉu vi ne aŭdis, ke oni povas ekzameni tion tutcerte? Mi povas fari tion kaj neblas, ke iu trompu min.” Vidante la atenton de Joakino li aldonis: “Mi eĉ povas rompi sorĉon se mi certe vidas, ke temas pri sorĉo.”

“Ĉu vere? Ho mi pagus bone se vi min helpus.”

“Ne, karulo, vi ne bezonas pagi min. Mi ne estas sorĉisto, sed nur sorĉrompisto. Alportu al mi besteton, kiu venis el via kapo kaj haron de la persono, kontraŭ kiu vi havas suspekton.”

La sekvantan tagon li venis kun flava larvo sufiĉe granda, kiu venis

el lia nazo, kaj longa haro de virino. Aleksandro metis ambaŭ objektojn ceremonie en vitran ujon, kian Joakino ĝis tiam neniam vidis, enverŝis akvon kaj poste el stranga-forma boteleto iom da odoranta etero. Li skuis ĝin teatrece kaj observis la enhavon poste kontraŭ la sunlumo. Fine li elprenis la vermon kaj la haron kaj rigardis ilin tra dika botanika lenso, foliumis en dika libro, kiu enhavis multajn bildojn de amuletoj kaj talismanoj. La indiĝeno eĉ ne forturnis la okulojn de li. Ĉion li observis kun malfermita buŝo. Oni povis bone rimarki, ke li jam estis konvinkita pri la superhomaj fortoj de Aleksandro. Kaj ĝuste tio estis la intenco de Aleksandro, por ke la homo sekvu lian konsilon.

“Vidu, Joakino, vi tute ne estas ensorĉita. KREDU min! Tamen por ke vi mem estu tute certa mi donos al vi absolute certan pruvon. Mi donos al vi sorĉrompilon al kiu nenia sorĉo povas rezisti, ĝi estu kiom ajn ruza.”

Li faris sur paperon kelkajn strangajn desegnojn plurfoje enrigardante en la libregon, kaj faldis ĝin laŭ nekutima maniero.

“Metu tion dum la nokto sub vian kapon. Ĝi tutcerte rompos ĉian sorĉon. Se post tio elvenos pli da vermoj el via kapo, tio absolute klare montros, ke vi estas nur malsana. Tiukaze venu al mi kaj mi donos al vi letereton por Doktoro N.N. Li ne postulos de vi multe da mono!”

La viro tamen ne venis.

“Domaĝe, ke mi ne sukcesis konvinki lin,” diris Aleksandro kelkan tempon poste. Sed estis alie. La hazardo volis, ke la iam al ni portita

larvo estu la lasta, kiun enhavis la vundo ! Post tio la vundo fermiĝis kaj la homo baldaŭ resaniĝis. Nun li estas firme konvinkita pri la mistera forto de Aleksandro rompi sorĉojn ! Kaj ne nur tio. Li distrumpetis sian laŭdon. La laŭdon de tiu homo kiu “savis lin kaj eĉ ne postulis monon por tiu granda servo !” Baldaŭ venis la sekvoj. Venis viroj kaj virinoj, eĉ de tre malproksime, kaj petis Aleksandron ke li rompu ian ofte tre strangan sorĉon, kiu ilin malsanigis aŭ kaŭzis al ili ian malbonon.

En la komenco Aleksandro estis embarasita pro tiu tute ne celita gloro ; sed li baldaŭ vidis, ke tiu kredo donis al li subite la eblon influi la duonsovaĝajn najbarojn, kiuj neniam aŭdis pri higieno k.t.p. Li nun purigas malpurajn vundojn per desinfektaĵoj kaj ilin bandaĝas. Li diras al patrino kies infano estas “ensorĉita” de intesta kataro, ke lia sorĉrompaĵo tute ne povas helpi al la infano, se ŝi donas al ĝi eĉ guton da neboligita akvo. Preskaŭ ĉie la indiĝenoj trinkas ege infektan akvon malpurigitan de la dombestoj. Al alia patrino, terure malpura, kiu plendas pri “ensorĉitaj” doloroj en la dorso, li donas krom reŭmatisma pomado ankaŭ la kredon, ke nek tiu nek alia sorĉrompaĵo povos helpi al ŝi se ŝi ne plenumas ĉiutage tri kondiĉojn : 1. Kiel unua laboro balai la kuirejon, 2. elpelu la porkojn el la kuirejo dum brulas tie fajro (tio praktike estas dum la tuta tago) kaj 3. lavi la manojn antaŭ ol ŝi prenas ion manĝeblan.

“Ne venu plu al mi se vi ne resaniĝos ! Mi vidos bone ke vi ne obeis al mia postulo, se tiu sorĉo ne rompiĝos. Mi ne havas tempon labori por neobeema persono !”

Per simplaj hejmaj sanigiloj li tiel

jam helpis al multaj homoj, sed kiam li vidas, ke iu bezonas nepre helpon de kuracisto li ĉiam diras : “Vidu, mi metos la haron de la ensorĉinto sur tiun kruceton. Se vere iu ensorĉis vin la kruceto restos trankvila, sed se vi ne estas ensorĉita, nur malsana, kaj bezonanta kuraciston, ĝi moviĝos.” Kaj dum li metas per unu mano ceremonie la haron sur feran kruceton kuŝantan sur kartono, li per la alia mano ĝin movas per magneto kaŝita sub la kartono.

“Vidu ! Kiel klare la kruceto respondas ! Sankta kruco ne povas mensogi. Obeu nun kaj iru tuj morgaŭ al la kuracisto !”

Tiu spontanee moviĝanta kruceto estas tiom forta konvinkilo, ke jam eĉ la plej fervoraj kontraŭuloj de kuracisto obeeme konsultas tiun. Tiel estas eĉ bone esti famekonata “rompisto de sorĉoj”.

RIVALOJ

Ni ekstaris vang' al vango.
Muĝis sango !
Muĝis sango !

Mi mezuris lin malame,
Li min same !
Li min same !


Mi forkraĉis elokvente,
Li samtempe !
Li samtempe !

Firmpremiĝis mano mia,
Ankaŭ lia !
Ankaŭ lia !

Pugno frapis la fiulon,
En spegulon !
En spegulon !

Eli Urbanova.

Enigma Konkurso N-ro 83



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 187 : 21, ĉar tiuj, kiuj trovis kvar bonajn parojn, ankaŭ trovis la kvinan.

N-ro 188 : Oni lin konas kiel blankan lupon, kiel makulharan hundon, kiel malbonan moneron.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 79-a konkurso : S-ro A. G. Rickwood (Brit) 147, S-ro C. Rogister (Belg) 145, S-ro F. Jelenc (Alĝerio) 142 p.

Enigmo N-ro 191 :

o r e e d o p i a a l k a k - o - n - l i
- i l t - l r a b l i a c - r n o - o - c
a - i - t i u r s - p r e r e o - o - t -
l e o o - o - o - - p r t - o r a t i z i
- z - - a r t - a e r a u n - a s - d o m
n - k r - o - t - r o t f i n b o m i n i
a k t o - a e d i - r e k o n o p o o - p
p r a k a - - o m p e r a r e - o - - p a
r e - u l a o - e r e o n d - o - p p - s
o - m - e - g a n r i g e n - o - i r - j
- p a s - k - m i - m - g e k - i - e p -
e a l a s - s o n n - g a k r e t e g - a
l i v a p e o r o m a r o - ĉ o r i n - c
e - o ŝ i r p a l o r f - l - l i t e t e
n i - t r o e n e - k e r a f o p a l o s
o - f - k - l - t l - o l o - n i - n i d
- u - o - k i r - - a m o - e d e s a n o
a z o - o r o - p k - a - a - o l e n a r
d a m o - i u r a t i e - ĉ a k a l l i o
i l e - s e n i m a d - o - c o r e a r -
n - r m e l u n i n - g b l i t o p n - a

Jen tute fuŝita krucvorto kaj mi esperas ke vi povos reordigi ĝin. Por atingi tion vi desegnu la liniojn ĉirkaŭ kaj inter la literoj kaj anstataŭigu la streketojn per nigraj kvadratetoj. Tiam vi distondu la tutan figuron en $7 \times 7 = 49$ kvadratojn, kiuj do ĉiuj enhavos $3 \times 3 = 9$ literojn (aŭ streketojn). Tiam vi klopodu meti la 49 pecojn tiel, ke reaperas la bona krucvorto. La nigraj kvadratoj formas ĉiel simetrian figuron.

Enigmo N-ro 192 : El la literoj de ĉiu paro da vortoj faru novan vorton. La komencliteroj de la novaj vortoj tiam formas en la sama sinsekvo esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. 1. amo-spiti; 2. ĝino-inde; 3. rimo-bazo; 4. piko-sepo; 5. naso-diri; 6. arte-tubo; 7. lami-

unio; 8. doti-naso; 9. lako-piro; 10. maro-fosi; 11. ciro-deka; 12. dato-pino; 13. miro-napo; 14. milo-napo; 15. roti-meza; 16. doni-rara; 17. arte-aŭlo; 18. aŭlo-nigre; 19. turo-bati; 20. majo-sidu; 21. fago-bori; 22. tiam-savo; 23. taso-reto; 24. ŝati-koro.

[^]
Cu vi jam pagis vian kotizon por 1954 ? Dankon !

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 255

5-an de novembro 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	9019	7894
Individuaj membroj :		
MJ	912	900
MA	3787	3892
MS	520	606
Patronoj ..	10	6
DM	265	261
HM	58	58
	5552	5723
	14571	13617

DELEGITOJ

Aŭstralio

Canberra. VD : vakas.

Belgujo

Antwerpen. FD (Turismo) : G. Vermandere, 15 rue de la Loi. Tel : (03) 35.36.42.

Brazilo

Muritiba. D : M. Borges dos Santos, Agência Municipal de Estatística.

Rio de Janeiro. FD (Pentroarto) : Wladimir S. Silva, Praça da República 54—I and. Tel : 42-4357.

São Caetano do Sul. D : J. Dias Pinto, Industria-Mecânica Pollone ; Caixa Postal 172. Tel : 367.

Tupaciguara (M.G.). D : J. Custódio Machado, Rua Gabriel Felipe de Faria n-ro 8.

Danlando

ĈEFDELEGITO : T. Aardestrup, Strandboulevarden 66, København Ø. Tel : Tria 3309.

Egiptujo

Cairo. D : Said Saleh, 6 Str. Al-Eskandarani, Str. Fuad, Shoubra, Cairo. Tel : 27588.

Francujo

Paris. FD (Revizio de manuskriptoj) : vakas.

Germanujo

Recklinghausen. D : J. Waldmann, Hummeltenbrink 2.

Rendsburg. D : F-ino A. Wolff, Pommernweg 18, Neuwerker Gärten.

Hispanujo

Barcelona. VD : P. Claramunt, Torrente de las Flores 12. Tel : 28-71-70.

Valencia. FD (Inĝenieraj aferoj) : E. Miralles, Félix Pizcueta 6. Tel : 55023.

Italujo

Belluno. FD (Terkulturo) : G. Perini, Ispettorato dell' Agricoltura. Tel : 2131.

Perugia. D : D-ro P. Rizzo, Prefettura. Tel : 23275.

Trieste. FD (Sporto) : F. Cinti, Gretta di Sopra 235. Tel : 32442.

FD (Teozofio) : R. Bisi, Via Carducci 28. Tel : 29085.

Jugoslavujo

Novi Travnik. D : Gabrijel Strah, Hotel Bratstvo.

FD (Tekniko) : La D.

Palić. D : Mr. Aurel Stadler, Palić, Vojvodino. Tel : 7.

Rijeka. FD (Industrio — lada) : M. Jakupović, Tome Ladislava 20-II-Salita. Tel : 24-29.

Zagreb. FD (Filatelo) : Z. Rehorić, Srebrnjak 47, Zagreb III.

Nederlando

Amsterdam. FD (Socia laboro) : F-ino L. Adelaar, Roemer Visscherstraat 47, Amsterdam W. Tel : 81792.

Deventer. FD (Profesi-konsilado) : vakas.

Svedujo

Göteborg. D : E. Vilborg, Övre Djupedalsgatan 11, Göteborg C.

Svislando

Genève. FD (Konsulaj aferoj) : R. Harry, Ĉefkonsulo Aŭstralia, 41 Quai Wilson. Tel : 2-41-60.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Steinemann, F-ino E., Bern, Svislando

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

602. Popović, S-ro B., Beograd, Jugoslavujo

603. Ždijala, S-ro F., Beograd, Jugoslavujo

- 604. Severo, S-ro J. C., Bagé, Brazilo
- 605. Pasquali, S-ro A., Porto Alegre, Brazilo
- 606. Almada, S-ro F. S., Santos, Brazilo
- 607. Castro, S-ro A. F. de C., Rio de Janeiro, Brazilo
- 608. Légal, S-ino M., Vanves, Francujo

PATRONOJ 1954

- 1. Williams, D-ro F. J., Melbourne, Aŭstralio
- 2. Wooding, S-ro N., Leicester, Anglujo
- 3. Lijn, S-ro G. van der, Bruxelles, Belgujo
- 4. Gueritte, S-ro T. J., Surbiton, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

- 1. Hehir, S-ro C. P., Kalgoorlie, Aŭstralio
- 2. Latimer, S-ro R. F., Nowra, Aŭstralio
- 3. Newman, S-ro A. D., Cangai, N.S.W., Aŭstralio
- 4. Knight, S-ro F. E., Dorchester, Anglujo
- 5. Worcester, S-ino D. M., London, Anglujo
- 6. Ritzaŭ, S-ro V., Køge, Danlando
- 7. Jaehn, S-ro W., Düsseldorf, Germanujo
- 8. Aldeguer, S-ro J. L., Barcelona, Hispanujo
- 9. Aprosio, S-ro E., Torino, Italujo
- 10. Boscarino, S-ro G. S., Ragusa, Italujo
- 11. Lapenna, S-ino E., Zagreb, Jugoslavujo
- 12. Zorgdrager, F-ino C., Amerongen, Nederlando
- 13. Bøe, S-ro J., Leknes, Norvegujo
- 14. Christensen, S-ro N., Hamar, Norvegujo
- 15. Forsberg, S-ro S. O., Sarpsborg, Norvegujo
- 16. Haugen, S-ro S. L., Kongsberg, Norvegujo
- 17. Rian, S-ro P., Skogna Markabygd, Norvegujo
- 18. Rosbach, S-ro H. A., Hasvik, Norvegujo
- 19. Rosbach, S-ro J. H., Sarpsborg, Norvegujo
- 20. Sørberg, S-ino M., Hamar, Norvegujo
- 21. Vik, S-ro V., Sarpsborg, Norvegujo
- 22. Holloway, S-ro J. F., Trentham, Nov-Zelando
- 23. Antunes, S-ro J., Lisboa, Portugalujo
- 24. Pfanner, S-ro J. R., Ganderhun, Sieraleono
- 25. Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Svedujo
- 26. Ekman, S-ro A., Norrahammar, Svedujo
- 27. Gustafsson, S-ro K. E., Bergvik, Svedujo
- 28. Lind, S-ro E., Trollhättan, Svedujo
- 29. Mellberg, F-ino G., Varberg, Svedujo
- 30. Moberg, S-ro K. J., Bromma, Svedujo
- 31. Nilsson, S-ro N. G., Göteborg, Svedujo
- 32. Svensson, S-ro S., Norrahammar, Svedujo
- 33. Culbert, S-ro S. S., Seattle, Wash., Usono
- 34. Moline, F-ino R., Tacoma, Wash., Usono

- 35. Sykora, S-ro M., B. Petrovac, Jugoslavujo
- 36. Shaw, S-ro F. W., Whitworth, Anglujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : J. W. Course 40ŝ., H. Hawker 7ŝ., E. B. Johnson 20ŝ., D. R. T. Jones 2ŝ. 6p., J. Thibon 11ŝ. 5p.

DONACOJ al Fondaĵo Montevideo : Antaŭe £56 9ŝ. 0p.; E. Keller 32ŝ., F-ino M. Noll £5, F. W. Shaw 10ŝ. 6p., T. J. Gueritte £5, G. Odent 10ŝ., J. Isbrucker £2, S. Culbert 23ŝ. 4p., G. Ventura 14ŝ. 6p., E. Carlén £20, H. Steiner £1, A. Vigliani 4ŝ., Argentina Esperanto-Rondo £3, Saldanha Carreira £1, S-ro W. von der Ley 8ŝ., Esp.-grupo Tailfingen 18ŝ., D-ro W. P. Roelofs 18ŝ., "Norda Stelo" 25ŝ., N. Christensen 10ŝ., S-ino M. Sørberg 25ŝ., J. A. Kleven 5ŝ., S-ro Haakenstad 5ŝ., G. Johannessen 5ŝ., F-ino E. Stang 5ŝ. Sumo ĝis fino de oktobro £104 7ŝ. 4p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 31a de oktobro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Argentino ..	500	950	190.0
2. Italujo ..	2400	2945	122.7
3. Maroko ..	600	700	116.7
4. Francujo ..	5200	5786	111.3
5. Germanujo ..	3200	3605	112.6
6. Aŭstralio ..	900	1010	112.2
7. Sudaŝriko ..	300	330	110.0
8. Aŭstrujo ..	800	860	107.5
9. Svedujo ..	5500	5916	107.5
10. Svislando ..	1450	1505	103.8
11. Usono ..	2300	2341	101.8
12. Norvegujo ..	2100	2134	101.6
13. Nederlando ..	4600	4654	101.2
14. Belgujo ..	2200	2189	99.5
15. Danlando ..	2500	2455	98.2
16. Japanujo ..	900	870	96.6
17. Urugvajo ..	250	240	96.0
18. Britujo ..	10000	9464	94.6
19. Hispanujo ..	1500	1395	93.0
20. Finnlando ..	2200	2020	91.8
21. Kanado ..	300	250	83.3
22. Kubo ..	250	205	82.0
23. Islando ..	450	360	80.0
24. Portugalujo ..	600	470	78.3
25. Irlando ..	250	185	74.0
26. Novzelando ..	900	635	70.5
27. Jugoslavujo ..	1500	1080	72.0
28. Brazilo ..	6500	4520	70.3

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj la vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero.
S-ta Johano 1. 14.

Ringwood Grammar School (fondita en 1577), **West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo**, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al **Generala Eduka Atesto** aŭ por libertempoj.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage pere de la Sekretario de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Internacia Kultura Semajno, 16-23 Julio 1954, en franca Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono S-ro G. Odent, Lycée Chanzy, CHARLEVILLE (Ardenes), Francujo. Karavano al Harlema aranĝota fine de la monato. Represo petata.

Astrologio. Fidinda konsilo pri harmonio en amikeco kaj edzeco laŭ individuaj horoskopoj de la kompanianoj de Gebh. Jocham, Roseninstr. 106, STUTTGART—N., Germanujo. Sendu precizajn naskodatojn (ankaŭ horon kaj lokon). Kosto 30 ŝil. angl.

42-jara instruisto deziras korespondi pri diversaj temoj. Intereso: literaturo, humanistaj aferoj, kaj la instrua profesio. Nepre respondos. Jarvis E. Bush, 3700 North 75th Street, MILWAUKEE 16, Wisconsin, Usono.

Folklorajn gramofondiskojn interŝanĝas laŭ interkonsento José Drucker, Gualaguaychu 1081, BUENOS AIRES, Argentino.

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo. F-ino Edna Perkins, 13 Brooklands Terrace, Little Harwood, BLACKBURN, Lancashire, Anglujo.

Serĉas foto-kolor-diapositivojn (24/36mm) de insulo Capri, Mallorca, event. aliaj. Donas interŝanĝe diapos. de Svislando, poŝtmarkojn, E-kongr.-stampojn. Anderegg-Gurtner, HORN (Bodensee), Svislando.

Mi bezonas mielglumarkojn kaj bildojn de abelbredado. Rekompenco per pm. aŭ kiel vi deziros. S-ro R. C. Blake, Tower Hill, HORSHAM, Anglujo.

Knabino 11-jaraĝa deziras korespondi kun samaĝaj geknaboj: F-ino Sylvia Blake, Tower Hill, HORSHAM, Anglujo.

Ni deziras korespondi kun la tuta mondo: F-ino A. A. Wiltjer, Novastr. 8, Paterswolde, GRONINGEN; F-ino C. de Jonge, Paterswoldseweg 98, GRONINGEN, Nederlando.

Deziras korespondantojn 70 knaboj (13-15 jaraj). Ankaŭ ekzemplerojn de lernejlaboro por ekspozicio en julio 1954. Respondu al F. B. Hotchkin, Elliston County Secondary School, CLEETHORPES, Lincolnshire, Anglujo.

32 reklerigataj geïnstruistoj de la ŝtato arde deziras interŝanĝi korespondadon kun fremdaj samprofesiuloj. D-ro Anakreon Stamatiadis, Str. Rodou 23, ATHENAI 8, Grekujo.

Finna Esperantisto deziras interŝanĝi materialojn pri reklamo, ekz. afiŝojn kaj reklamgazetojn kaj ankaŭ notojn kun gesamideanoj tutmondaj. S-ro Pertti Paakkanen, KALLIOSUO, Finnlando.

Verkoj de Cervantes plej laste eldonitaj en ĉiuj landoj kaj lingvoj min interesas, kontraŭ libroj el mia lando. Sendu proponojn al S-ro Dalmaŭ, Lauria 98, BARCELONA, Hispanujo.

Geliceanoj, 13-16 jaraj, kaj partoprenantoj diversaĝaj de nova kurso, volas korespondi kun la tuta mondo. Adresu: Esperanto, SOMERO, Finnlando.

Juna teknikisto deziras korespondadi tutmonde: Gallus Wiclaw, ul. Gartyzancka 124, PABIANICE, Pollando.

Ostrava Junularo aranĝas 17-12-53 letervesperon por ligi kontakton kun kluboj en tuta mondo. Ni ŝatus interŝanĝi spertojn pri kunvenaj programoj kaj pri gvidado de kursoj. Skribu al Libuše Bohanusová, Privožská 23, OSTRAVA I, Ĉeĥoslovakujo.

Fraŭlino, nova Esperantistino, deziras korespondi kun la tuta mondo pri turismaj aferoj kaj vojaĝoj. Adreso: F-ino Liliane Theodon, Route de Bergues, GHYVELDE (Nord), Francujo.

Filatelisto deziras korespondi kaj interŝanĝi po 25 diversaj pm. kontraŭ 25 pm. de diversaj landoj. Mi certe respondos. S-ro Heinz Berger, (22b) LÜCKENBURG post Hermeskeil, Germanujo.

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia
retrovita korespondo (kun la francaj
eminentuloj. Prezentado kaj
komentado de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906 388 paĝoj

2a volumo, 1907-1914 374 paĝoj

21 × 14.5 cm., bindita

Nuna prezo :

Ĉiu volumo 17ŝ. 6p., afr. 9p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Antaŭ Haarlem

SKOTLANDO VOKAS VIN !

INTERNACIA FERIA SEMAJNO

Julio 24a ĝis 30a, 1954

en

**Newbattle Abbey Kolegio,
proksime al Edinburgh**

Modernaj komfortoj - Bonaj manĝaĵoj
Allogaj ekskursoj kaj aliaj distraĵoj
Modera kosto - Nur 60 lokoj

Skribu tuj por detaloj al :

**La Sekretario,
Edinburgh Esperanto Society,
20 Glendevon Road, Edinburgh 12,
Skotlando**

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva
perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj
problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto
spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ dumil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma
politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**